

esperantouso

The ELNA

Newsletter: News of the Language Problem and Esperanto as the solution

1991(3)

Making News This Issue

Membership

ELNA now has more than a thousand members. But this does not solve all our membership problems. Mike Donohoo, Director of the Central Office, talks about how *you* can help.

See Page 5

And Now, The News

The Universala Esperanto-Asocio is now providing information for external use. For your enjoyment and possible use, we provide English translations of some items.

See Pages 7-8

Letters, We Get Letters

Greetings from Haiti ... pen-pals from the USSR ... a request for information from Poland ... the Intermountain Conference ... the Catholic Church and Esperanto ... a national Esperanto organization in Albania ... all in the letter column!

See Pages 11-12

In This Issue:

Universala Esperanto-Asocio 2

An Oasis in Esperanto-Land 9

Pen-pals from Eleven Countries on Three Continents 15

And Much, Much More to Delight and Inform You!

Agoj de ELNA

Proponoj Akceptitaj de la Estraro

La Estraro de ELNA lastatempe akceptis la jenajn proponojn:

(1) La Estraro de ELNA rajtigas la Centran Oficejon elspezi ĝis \$500 dum la fiska jaro 1991 por eldoni kaj dissendi unupaĝan informilon por disdonado ĉe paroladoj pri Esperanto, kondiĉe, ke tiu informilo estu provizita al kluboj kaj unuopuloj laŭ la jenaj kondiĉoj: (1) Neniu grupo aŭ unuopulo rajtas ricevi, senkoste, aron da informiloj pli ol unu fojon en la jaro; (2) Skribita peto devas veni al la Centra Oficejo kun la datoj de la okazo kaj sufiĉe da detaloj por certigi, ke la celoj de la okazo ne kontraŭas la celojn de ELNA laŭ ties Statuto; (3) La petinta

grupo aŭ unuopulo devas pagi la sendokoston.

(2) (a) ELNA aperigu specialan faldfolio-serion, konsistantan el ses titoloj, kiuj estos: "Esperanto Literature", "The Artificial Language Movement", "History of the World Esperanto Movement", "World Language Problem Today", "Is There an Esperanto Culture?" kaj "Zamenhof: Creator of Esperanto";

(b) Ĝis la fino de la unua plena kalendara jaro post apero de ĉiuj faldfolioj, ELNA vendu la serion al

daŭrigota sur paĝo 15

V O T E !

Our goal for 1991 1150


ELNA membership 1990 1031

ELNA membership 1989 931

ELNA membership 1988 778

ELNA membership 1987 572

Membership 1008 on April 9!



EDITORIAL

UNIVERSALA = WORLD

Some 32 years ago I really started digging into Esperanto, and by the summer of 1959 I felt confident enough to write a letter (in English!) and send a check for \$4, generously provided by my parents, to the only real address that I could find, the one at Eendrachtsweg 7 in Rotterdam, The Netherlands, for membership in the organization known as the Universala Esperanto-Asocio. Shortly thereafter, I was drafted to go off to Denmark for six months as an American Field Service exchange student. In Copenhagen my mail caught up with me—some seven issues of the magazine *Esperanto* and the first part of the 1959 *Jarlibro*. This was my first introduction to real Esperanto, as opposed to the carefully manufactured textbook exercises. I spent hours going over those seven magazines, paragraph by paragraph, reading them out loud to myself over and over again until I felt absolutely sure of their meaning. In a very real sense, I finally succeeded in learning Esperanto from the pages of UEA's magazine with the, for me, very appropriate name.

Esperanto opened a whole world to me. Previously, the language had been just that—de Beaufront's *nura lingvo*. Now I learned, not only the words and syntactic constructions, but also the details of the Esperanto movement and its associated culture. I learned about World Esperanto Congresses (enthusiasm was high for the forthcoming one—"forthcoming" in the pages of the magazine; it was already underway when I reached Denmark—in Warsaw, Poland). I learned about the existence of books—not textbooks!—in Esperanto, and for the next two years, unable to afford any, I salivated over ads for *Esperanta Antologio* and Julio Baghy's *Songe sub pomarbo*. I learned about radio broadcasts in Esperanto, and almost jumped for joy the night I first heard, through a cloud of static, the North Vietnamese ambassador to Moscow being interviewed in Esperanto on Radio Warsaw. From the *Jarlibro* I learned of the far-flung network of delegates in some sixty different countries, and I actually went and visited the one in Randers, the town in which I

was living, an elderly lady named Acta Nielsen. I learned the names of the movers and shakers of the international Esperanto movement—UEA President Giorgio Canuto, Vice-President (later to become President) Hideo Yagi (of distant, exotic Japan!), General Secretary Ivo Lapenna. I learned...

The Esperanto movement has its own very loose, often unofficial, Table of Organization. There are the local Esperanto groups, the ones that hold meetings every month (in many places throughout the world, every week); some countries have fewer—Israel has three—and some have more—there are two or three dozen in the United States, 162 in little Hungary. Above the local groups, and sometimes—though not in the United States—officially associated with them, are the national organizations such as ELNA. And over and above ELNA, attempting to coordinate the international Esperanto movement, is the Universala Esperanto-Asocio, the World Esperanto Association, officially associated with some fifty of the world's seventy national Esperanto organizations.

Those who are interested in the history of UEA should read Mark Fettes's prize-winning essay on the subject; it was printed in the January, 1991, issue of *Fonto*. In short, UEA was founded by a Swiss teen-ager, Hector Hodler, more than 80 years ago, as a service organization for individual Esperanto speakers. For various political and financial reasons it became, as well, a forum for the various national Esperanto associations more than 60 years ago. Today it fulfills, in my opinion, three major functions: it is the primary lobbyist for Esperanto in the international community; it continues to serve as a forum for discussion and resolution of problems in the international Esperanto movement; and it functions as a center from which isolated Esperantists—those like myself who had no contact with their national Esperanto movement, and more particularly those who come from parts of the world where there is no local or national movement—can be initiated into the international Esperanto movement. In this last category, UEA has

scored a few notable successes in recent years, among them its support for Hans Bakker's almost single-handed attempt to introduce Esperanto into Africa, with great success (the first African Esperanto Congress was held in Togoland at the end of 1990), and its sponsorship of Joachim Werdin's teaching excursions into Asia, with the resultant creation of new Esperanto organizations in at least Malaysia, Nepal and Singapore.

As you can see from the above, UEA plays a very different role in the Esperanto movement than does ELNA. ELNA supports the promotion and teaching of Esperanto in the United States; UEA operates on a worldwide scale. *Esperanto USA*, though it does attempt to keep ELNA members abreast of some Esperanto activities outside the U.S., must dedicate most of its space to the Esperanto movement here at home; *Esperanto's* attention is more wide-ranging. Because many of ELNA's members are new Esperantists, much of *Esperanto U.S.A.* is in English; because *Esperanto's* readership is scattered out over a hundred countries, the magazine must be entirely in Esperanto.

My reason for mentioning all this is to let you know the advantages of belonging to UEA as well as to ELNA. And the advantages go both ways. UEA has two sorts of members, associate (members of associated national organizations who do not pay dues to UEA) and individual (those who pay dues to UEA). Over the last year, a small increase in individual memberships has been far more than offset by a drastic decrease—crash, if you prefer—in associate memberships, due mainly to economic conditions in Poland and Czechoslovakia. UEA now has a campaign underway to increase the number of individual members to ten thousand. Because of UEA's dues structure, this relatively modest increase would more than solve the financial problems created by the (hopefully temporary) loss of several thousand associate members.

If you are not yet a member of UEA, I hope that what I've written above will convince you to at least consider the advantages of joining.

Don Harlow

NEWSBRIEFS

Esperanto in the Media

The Mark Twain Boyhood Home Associates newsletter *The Fence Painter* (Summer, 1990) reports Ron Glossop's gift of a copy of the comic-book version of Tom Sawyer in Esperanto (see EUSA 1990(6), "Regional Reports") in an article "Tom Sawyer in Esperanto." The article gives some details on Esperanto's history, structure, and current use. It also includes a reproduction of the cover of the Esperanto booklet. (sent by Humphrey Tonkin)

"Esperanto is an ethic," says June K. Fritz in a letter to the Lincoln, NE, *Star* (Jan. 7, 1991). Ms. Fritz responds to the notorious Chicago article about Esperanto and invites everyone to look into Esperanto by checking the Richardson book out of their local library. (sent by June K. Fritz)

Henrietta Kroll responds to the AP-distributed article about Esperanto and the MLA in a letter to the LeMars, IA, *Daily Sentinel* (Jan. 21, 1991). Ms. Kroll defends Esperanto, corrects the original article's botched example of Esperanto, and invites anyone interested in the language to contact her. (sent by Henrietta L. Kroll)

Turkey has now repealed a law banning speech in languages other than "the official, primary languages of countries recognised by Turkey." According to *The Economist* (Feb. 9, 1991), the purpose of this law "was not to encourage police raids on classes in Esperanto" but to suppress the identity of the Kurdish people. Could this be the reason for the recent foundation of an Anatolian Esperanto Association? (noted by David R. Brown)

Unicode, a new super-ASCII, is described as "an Esperanto for the electronics age" by Johanna Ambrosio of *Computerworld* (Feb. 25, 1991). Ambrosio, however, expresses a hope that Unicode "has more success than the

ill-fated Esperanto language." (sent by David R. Brown)

"Computers Gain New Respect as Translators," Warren E. Leary informs us in the New York, NY, *Times* (March 5, 1991). The article devotes much space to the "interlingual" approach to machine translation, in which "all languages are considered modules or spokes of a wheel that address a hub, which contains a common, central set of meanings—kind of an Esperanto for machine translation—before being translated into one another." This idea is presented as a recent development of American high-tech, and no mention is made of, for instance, BSO's Distributed Language Translation system, which has been in development in The Netherlands for almost a decade now and uses the real Esperanto as its interlingual hub... (provided by John Champlin)

Peter Fuhrman, in an article in *Forbes* (Mar. 18, 1991), describes a harmonized set of rules governing public securities in all major economies, now under development, as "accounting's equivalent of Esperanto." In fact, he likes the metaphor so much that he titles his article "Esperanto for accountants." (sent by John Massey)

During a showing of the British comedy series "Home, Sweet Home" in Philadelphia (last week of March, 1991), a character in a situation in which people of different cultural backgrounds and languages are trying to communicate suggests: "Why not have us all speak together in Esperanto?" The ironic reply is: "Then who would be the foreigners?" (reported by Mubarak Anwar Amar)

During an episode of "Twin Peaks" (April 4, 1991), David Lynch, the director, made a cameo appearance as an FBI agent. Seeing an attractive waitress in a local diner, he remarked to his companion that he wished he could speak French. He nevertheless was going to approach

her and try some "counter Esperanto." (reported by David R. Brown)

An article by Arlyn Kerr in the *Douglass Alumnae Bulletin* (Winter, 1991) of Rutgers University mentions that a previous knowledge of Esperanto made the learning of Spanish much easier for Kerr and her husband. (sent by Arlyn Kerr)

Peter M. Benton, discussing machine translation in "The Multilingual Edge" in *Byte* magazine (Mar. 1991), includes a short description of the Dutch firm BSO's Distributed Language Translation system, which "uses Esperanto as its interlingua. The Esperanto language was invented in the late 1800s for scientific discourse." (thanks to Jeff Kunce)

The bulletin *Something Extra* (Vol. 1 No. 25) of the Manhattan District of the I.R.S. alerts employees to the existence of the Esperanto Society of New York and its address, and directs them to Martin Roth in the Examination Division, who has information about the free postal course. (sent by Rochelle Grossman)

Joel Brozovsky, who works as an editor at Oomoto headquarters in Japan, has sent us information about several references to Esperanto in two English-language newspapers in Japan. *The Japan Times* published the notorious Chicago *Tribune*-AP article (Jan. 3, 1991), which encouraged a spirited defense of Esperanto from Fukuzo Hosokawa of Takamatsu in the same newspaper (Jan. 20, 1991). The *Mainichi Daily News* (Nov. 3, 1990), in an article on Keiji Nakazawa's *Barefoot Gen*, mentions the Esperanto translation (which it incorrectly suggests was inspired by the English translation). And the *Mainichi Daily News* (Jan. 30, 1991) and *The Japan Times* (Jan. 16, 1991), in two separate articles about the Servas organization, both mention that the name comes from Esperanto.



REGIONAJ KAJ FAKAJ RAPORTOJ

Esperanto-Agado en Usono

CALIFORNIA

La Esperanto-Asocio de Los Angeles festis la datevenon de L. L. Zamenhof, iniciatinto de Esperanto, sabaton la 8an de decembro, 1990. La programo komenciĝis per festa ĉina tagmanĝo ĉe restoracio en Pasadena; poste oni transiris al la kutima kunveno en la Pasadena Publika Biblioteko. Inter ĉefajoj de la programo estis originala kanto de Brian Burg, historioj pri kaj verkaĵoj de d-ro Zamenhof, kaj nostalgia retrovido al la frua periodo de la Esperanto-movado en Los Angeles fare de Elwin Reed. Partoprenis kelkaj novaj anoj. (el la bulteno de EALA, 1991(2))

La 16an de marto la Ligo de Orient-Golfaj Esperantistoj kaj la San Francisco Esperanto Regional Organization ekspoziciis okaze de la duonjara konferenco de Foreign Language Association of Northern California. Deĵoris ĉe la ekspozicia tablo Ĉien Mingĉi, Mike Donohoo, Don Harlow kaj Ionel Onet.

MARYLAND

Riĉa kaj korvarmiga Zamenhofa Bankedo okazis en Baltimoro la 20an de januaro—precipe korvarmiga pro la resaniĝo de Tom Goodman, kiu, kiel ĉiam, majstrece gvidis la bankedon. La partoprenintoj ĝuis ne nur ĉinajn manĝaĵojn sed ankaŭ inspiran kaj laŭsezonan prelegon de Tom. Tom parolis pri la Interna Ideo de la Esperanto-movado, amikeco, kaj la spirito de esperantistoj. Li memorigis, ke la esperantistoj devas ĉiam kuraĝigi unu la alian antaŭeniri tiujn idealojn kaj la lingvon Esperanto. Ankaŭ, Paul Smith regalis la ĉeestantaron per la deklamado de poemo "Al Blinduloj" verkita de Felikso Zamenhof, frato de la iniciatinto de Esperanto. (el *La Potomaka Esperantisto*, marto 1991)

ILLINOIS

La Esperanto-Societo de Chicago aranĝis, ke ankoraŭfoje Richard M. Daley, Ĉikaga urbestro, proklamu, ke 17-23 februaro 1991 estu Semajno de Internacia Amikeco per Komunikado, por agnoski la 104an datevenon de la lingvo Esperanto. La proklamo mencias, i.a., la propedeŭtikan valoron de Esperanto, la kandidatigon de UEA por la Nobel-Pacpremio en 1987, kaj la nunajn klopodojn enkonduki Esperanton en la lernejojn de Chicago. (proklamo provizita de la Esperanto-Societo de Chicago)

MICHIGAN

Sherry Wells parolis ĉe WJR-radio, vendredon la 22an de februaro. Tiu radiostacio ankaŭ atingas najbarajn ŝtatojn. Ŝia celo estis, parte respondi la demandon, kion ni povas fari post la Gofa Milito por malebligi estontajn militojn. Antaŭa intervjuo sugestis komunikadon, por kio la memevidenta respondo estas... (informo de Sherry Wells)

NEW YORK

La 14an de decembro 1990, la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la monda lingvo-problemo (CED) kaj la Traduka Fako de UNO prezentis la 9an Konferencon pri Lingvo kaj Komunikado ĉe 777 UN Plaza. Dek unu parolantoj prelegis pri Content Analysis in International Perspective. La prelegoj, ĉiuj en la angla lingvo, estis interesaj kaj tuŝis multajn flankojn de la konferenca temo. Proksimume sesdek personoj partoprenis la konferencon. La novjorka oficejo de UEA havis tablon en la konferenca salono kie oni povis trovi dokumentojn de CED kaj informon pri Esperanto. (laŭ raporto de Jim Medrano en *Novjorka Prismo*, Jan. 1991)

La 14an de decembro 1990

proksimume 40 personoj festis la naskiĝtagon de L. L. Zamenhof, la kreinto de Esperanto. Oni kunvenis en la Dag Hammarskjold Salono sur la 12a etaĝo de 777 UN Plaza, de kie oni povis vidi panoramon de la Orienta Rivero kaj la UN-komplekson. D-ro Julius Manson paroladis pri la vivo de Zamenhof kaj rekomendis librojn. Li ankaŭ parolis pri persekutitaj esperantistoj afrikaj kaj pri rezolucioj de UNESCO pri Esperanto. Poste oni babiladis dum pli ol unu horo kaj kantis Esperante. Jim Medrano vidbendigis la feston, la paroladon de Julius Manson, kaj la gastojn kiujn intervjuis Nijl Blonstein. (laŭ raporto de Thomas Eccardt en *Novjorka Prismo*, Jan. 1991)

La UEA Novjorka Oficejo kaj la Novjorka grupo dissendas al diversaj instancoj, okaze de la Monda Tago de Sano (7a de aprilo) leteron kune kun la letero de d-ro Julius Manson, kiu aperis en la *New York Times* la 21an de januaro, 1989, pri problemo de interpretistoj okaze de la armenia tertremo. (raportis Rochelle Grossman)

TEXAS

La 4an de februaro Roan Orloff Stone prelegis pri Esperanto al la ĉiusemajna lunĉkunveno de la Optimisto-Klubo en Marshall. Ilia celo estas havigi kason por helpi al gejunuloj daŭrigi la edukadon kaj instigi al gejunuloj resti en la universitato ĝis la fino de la studoj. Oni ricevis la informon pri Esperanto kun intereso, precipe kiam s-ino Stone klarigis al ili kial la angla lingvo ne estas la internacia lingvo; tio verŝajne trafis ilin ŝokige. Je la propono de s-ino Stone, la grupo akceptis donaci Esperanto-libron al la publika biblioteko; kaj laŭ letero de John K. Larson, Sekretario de la grupo, de la 18a de marto, oni efektive donacis du librojn al la Marshall Publika Biblioteko. (raportis Roan Orloff Stone)

EL LA CENTRA OFICEJO

Membroj—Novaj kaj Malnovaj

Novaj Membroj

Se vi estas membro de ELNA dum pluraj jaroj, vi sendube scias, ke la nombro de membroj rapide kreskis dum la pasinta kvarjaro. ELNA eĉ gajnis la Trofeon Fyne de UEA pro tiu kresko. ELNA nun havas pli ol 1000 membrojn, cifero kiu antaŭ nur kelkaj jaroj ŝajnus nekredebla.

La rapida kresko ŝuldiĝas al du faktoroj: unue, 1987 estis la jubileo de Esperanto, tial multaj homoj eksciis pri Esperanto pere de artikoloj en *Time*, *U.S. News & World Report* aŭ alia gazeto aŭ ĵurnalo. Due, ELNA pli trafe provis allogi homojn al Esperanto kaj oferti pli da servoj al la membroj.

Dum multaj jaroj la nombro de membroj de ELNA ĉiam restis inter 500 kaj 600, t.e. la membreca nivelo estis preskaŭ sensanĝa. Sed en 1988 ni gajnis 206 novajn membrojn, en 1989 153 kaj en 1990 100. Tamen tiuj ciferoj montras eblan problemon—ĉiujare ni ja gajnis novajn membrojn, sed malpli ol en la antaŭa jaro. Vi povas konstati, ke, se tiu afero daŭros, post nur unu-du jaroj la membreca nivelo denove stagnos. Tiam la membreca nivelo restus je 1000 aŭ 1100, kio ne estus kontentiga post la ĵus pasinta rekorda periodo.

Kion fari? La respondo estas simpla: ni devas allogi pli da membroj. Tamen tio estas malfacila afero en lando kie la meza usonano eĉ ne scias, ke Esperanto ekzistas. Eble vi pensas, "Nu, Usono ne estas preta por Esperanto." Fakte vi pravas, sed *Usono neniam estos preta por Esperanto se ni ne pretigos ĝin*. ELNA ja provas fari tion, sed ni bezonas vian helpon.

Kion vi povas fari? Vi povas informi homojn pri Esperanto, aŭ helpi al ni informi ilin. Ekzemple, se unu el viaj amikoj aŭ konatoj interesiĝas pri Esperanto, vi povas sendi lian nomon al ELNA. Ni sendos al li informilojn pri Esperanto, kaj mallongan leteron kiu informos lin, ke "*This information is being sent to you at the request of John! Jane Smith.*" Li ankaŭ ricevos poŝtkarton kiun li povos sendi al ELNA se li deziras eĉ pli da informo. Kiam ni ricevos la poŝtkarton, unu el la aferoj kiujn ni sendos al li estos aliĝilo al ELNA. Se Espe-

ranto-klubo ekzistas en lia urbo aŭ regiono, ni ankaŭ donos lian nomon al la klubo.

Se vi mem parolados pri Esperanto al iu grup, aŭ via klubo havos budon ĉe iu ekspozicio, vi povas disdoni informilojn kiujn ELNA kreis. Sub la rubriko "*Promotional Material*" en la katalogo de la Libro-Servo, vi trovos plurajn. (Vi ankaŭ povas donaci kelkajn al biblioteko, por ke oni disponigu ilin al la publiko. Tiel multaj usonanoj ekscias pri Esperanto.) Krom la informilojn priskribitajn en la Katalogo, ELNA ankaŭ havas du aliajn flugfoliojn, "*Esperanto: The Idea Behind the Language*" kaj "*Getting Involved with Esperanto*", kiuj estas tre bonaj por montri al homoj kiuj esprimas intereson pri Esperanto. Ĉiuj informiloj estas haveblaj kontraŭ malalta prezo.

Kelkaj plendis/ plendas pro la fakto, ke ELNA ne havas ian ajn *senpagan* informilon kiun membroj de ELNA povas mendi kaj disdoni al interesatoj. ELNA baldaŭ havos ion por ili. Dum la pasintjara Kongreso de ELNA en Meksikio, la Estraro aprobis la kreon de unupaĝa informilo pri Esperanto kiu estos senpage havebla por kluboj kaj individuoj. Vi devos pagi nur la sendokostojn. Mi esperas, ke la informilo estos havebla post nur kelkaj monatoj. Kiam ĝi estos preta, mi informos vin pere de *Esperanto U.S.A.* aŭ *ELNA Update*, kaj donos pli detalan informon.

(Se vi deziras fari eĉ pli por Esperanto en Usono, eble du libretoj helpos vin—*Questions and Answers about Esperanto* de David Wolff kaj *How to Promote Esperanto* de David Barron. Ili ambaŭ estas en la katalogo de la Libro-Servo sub la sama rubriko kiel la informiloj. La libretoj donas bonan konsilon al tiuj kiuj volas paroli pri Esperanto al ofte dubema publiko.)

Malnovaj Membroj

Kompreneble, ELNA bezonas ne nur novajn membrojn, sed ankaŭ bezonas reteni la nunajn membrojn. La membreca nivelo ankaŭ stagnos aŭ malkreskos se la nombro de "forfalintoj" (membroj kiuj ne realiĝis) estos tro granda. Ĉiujare ELNA, same kiel ĉiuj organizoj kun membraro, perdas iom da membroj. La kialoj por nerealigo estas multaj, sed la plej oftaj por ĉiu organizo verŝajne estas: 1) manko de mono; 2) tro altaj kotizoj; 3) perdo de intereso; 4) malkontento pri la organizo.

Kiel tiuj faktoroj afektas ELNAn, kaj kion la organizo povas fari pri ili?

• 1) En Usono ni nun travivas ekonomian kuntiriĝon, kaj tial la nombro de membroj kiujne realiĝis pro manko de mono estas pli alta. ELNA ne povas antaŭvidi tiajn problemojn, sed la organizo povas reteni kiel eble plej membrojn per atento al kialoj 2, 3 kaj 4.

• 2) La kotizoj de ELNA estas sufiĉe malaltaj kompare kun aliaj organizoj. ELNA eĉ havas specialajn membrecajn kategoriojn kun pli malaltaj kotizoj por junuloj kaj tiuj, kiuj havas almenaŭ 65 jarojn. Tamen la kotizoj ĉiam estos tro altaj por iuj homoj. Bedaŭrinde ELNA ne povas fari multon pri tio, nur provi teni la kotizojn je la sama kosto kiel eble plej longe.

• 3) Se iu membro perdis intereson pri Esperanto, mi povas diri al li, ke la Esperanto-movado estas eĉ pli interesa nun ol pasintec—kaj en kaj ekster ELNA. Estas pli da libroj, gazetoj, vojaĝeblecoj, kluboj, specialaj grupoj, ktp. Trafoliumu ekzemplerojn de *Esperanto U.S.A.*, *Esperanto*, *Heroldo*, aŭ la *Jarlibro* de UEA, kaj vi sendube trovos ion interesan por vi. ELNA ankaŭ ĉiam provas plibonigi la servojn kiujn ĝi ofertas, por ke ili restu interesaj al la membraro.

• 4) Se ial vi estas malkontenta pri la stato aŭ funkciado de ELNA, bonvolu informi nin! Se vi ne faros tion, la Estraro kaj la Centra Oficejo neniam scios, kial vi estas malkontenta, kaj kiel ni povas kontentigi vin. Vi povas informi la Estraron pri via malkontento se vi ĉeestos la venontan Kongreson de ELNA, aŭ pere de letero sendita al *Esperanto U.S.A.* Se vi estas malkontenta pri la servoj kiujn la Centra Oficejo ofertas, skribu al mi. Mi ne povas promesi tujan respondon, sed mi ja respondos al vi.

La Estonteco

Kiel la usona Esperanto-movado statos post kvin aŭ dek jaroj? Se ELNA atentos la supre menciitajn faktorojn, kaj ĉiam aŭskultos la ideojn kaj sugestojn de la membraro, la organizo sendube fartos bone. Se vi helpos, ĉu per informado pri Esperanto, ĉu per membreco en klubo aŭ ELNA, Esperanto ĉiam progresos en Usono. Antaŭdankon!

Mike Donohoo
Direktoro, ELNA C.O.

ANONCOJ

[La rubriko Anoncoj enhavas diversajn reklametojn, petojn, ktp., kiuj estas diskonigindaj sed ne povas trovi lokon en alia rubriko. Nek ELNA nek la redaktoro povas promesi aŭ prirespondecigi definitivon plenumon de io ajn promesita en anonco.]

Karlskoga Popola Altlernejo havas 8-semajnajn Esperantokursojn dum la tuta jaro. Oni studas Esperanton en klaso minimume 20 horojn semajne. Ĉiu semestro komenciĝas per komencanta kurso, kiun sekvas kurso por progresantoj. La lernejo bonvenigas ĉiujn aĝojn ek de 18. La gelnantoj loĝas en modernaj, unulitaj ĉambroj (inkl. duŝo kaj necesejo) kun komuna kuirejeto kaj TV-ĉambro. La loĝejoj situas bele apud lago kaj alloga naturo nur 1 kilometron de la urbo Karlskoga. Ĉiuj manĝas en la lerneja manĝejo. Por datoj, vidu la kalendaron. Por kondiĉoj kaj informoj, skribu al: Karlskoga Popola Altlernejo, Box 192, S-691 24 KARLSKOGE, Svedio, tel. (46 0586) 503 60.

Ekde 1989.10.02 funkcias telefona Esperanta gazeto en Montrealo. Ĝi nomiĝas "La Papago". Ĝi estas ĉiutaga, kaj daŭras inter kvin kaj dek-kvin minutojn. Ĝin prizorgas Patriko Monja. Kvankam montrealanoj povas aŭskulti ĝin senpage, ĝi kompreneble aŭdeblas ĉie en la mondo por tiuj, kiuj ne timas la telefonkoston. Por aŭskulti "La Papago"-n, simple telefonu al (1 514) 270 0054. Ĉe la fino, diru vian nomon, kaj, se vi deziras, ankaŭ artikolon por la morgaŭa eldono. La aparato limigas la daŭron de kontribuo je tri minutoj. Eblas kontribui sen aŭskulti la tutan programon, post premo de * sur klava telefono. Tio ebligas interalie daŭrigon de kontribuo post tri minutoj, per retelefonado. Por aliaj informoj: Patriko Monja, 7491 av. de Gaspé, Montréal, Québec, Kanado H2R 2A3, tel. (1 514) 270-8856.

Nuntempe fondiĝas Internacia Tradukreto Pere de Esperanto. La celo de la tradukreto estas, pere de oferto de traduko al firmoj, asocioj aŭ privatuloj, konigi Esperanton. Povas registri sin en la reto ĉiu bona esperantisto aŭ Esperantogrupo. Informojn de la reto kaj proponon de regularo al la kunlaborantoj oni povas ricevi de la sekretario: Paul SAMAIN, 9 avenue de Verdun, 60.200

COMPEIGNE, Francio, telefono (33) 44 20 16 34, telefakso (33) 44 86 11 36.

Internacia pacifista movado "Tutmonde" eldonas trimonatan cirkuleron *Kune*. Por informoj: Tutmonde, Apartat 313, E-08220 TERRASSA, Hispanio.

For sale: the papers of Byron Ela of Seattle, WA. Hundreds of 8x11" sheets of paper, both handwritten and typed, in folders. Neat, easy to read. All on Esperanto. Many vocabularies. Many letters written in Esperanto. A few items in English. A few family items. Numerous Esperanto printed newsletters and brochures. All material dated in the 1940's. Years of dedicated study of Esperanto are reflected in this collection. Lot: \$200 ppd, fully returnable. Subject to prior sale. Information from: Xerxes Fine and Rare Books and Documents, Box 428, Glen Head, NY 11545, tel. (516) 671-6235.

Konata eŭropa biciklisto Jorgos kunlabore kun diversaj asocioj invitas vin al Esperanto-staĝo, festoj, kunvenoj, ekskursoj, en la Ariege-Pireneoj de suda Francio inter la 25a de majo kaj la 2a de junio. Komencantoj eklernos per Ĉemetodo kun Carla de Lorenzi el Torino; progresantoj florumos diversstile kun Dimitar Terziev el Sofia; kaj Esperanto-spertuloj esploros natur-temojn kun Luigi Barbana el Gorizia. Por aliĝilo, petu al: M.J.C. Esperanto ĉe E. Lasserre, 8 rue des Ecoles, F-09600 LAROCHE d'OLMES, Francio.

La Esperanto-Societo Kebekia okazigos printempan renkontiĝon en Kebekio, pli precize en "Sainte-Catherine-de-Hatley", la 15an kaj 16an de junio 1991. Por informo: Esperanto-Societo Kebekia, 6358-A rue de Bordeaux, MONTREAL, Kebekio, Kanado H2G 2R8, tel. (514) 272-0151.

Ĝus aperis n-ro 1 de Rok'Gazet', kiu reklamas sin kiel Esperanto-Rok-Fangazeton. Ĝi enhavas 28 grandformatajn paĝojn, kun artikoloj pri esperantistaj rokgrupoj kiel Team', Persone, Kajto, kaj La Bleka Forfikulo kaj Sijaj Orelboristoj. Abonkoto por kvar numeroj estas \$20, kion oni povas pagi pere de la UEA-konto rokk-b, samtempe informante la eldonejon.

Por informoj: Rok'Gazet', c/o Eurokka, F-31450 DONNEVILLE, Francio, tel. (33) 61 81 95 65.

La Esperanto-Klubo Surmonteta en Kapstaar/Capetown/Kaburbo, Sudafriko, tute nediskriminacianta klubo dediĉita al la antaŭenigo de la scio kaj uzo de Esperanto, tutmonde serĉas kontribuontojn por novaĵgazeto. Kiu interesiĝas pri partoprenado, tiu petu informojn kaj kondiĉojn ĉe: Esperanto-Klubo Surmonteta, Green Level Students Union, University of Capetown, Private Bag, 7700 RONDEBOSCH, Republic of South Africa.

A special one-week Esperanto Institute will be held at the University of Hartford (CT) from August 12 to August 17, 1991. Elementary and Intermediate level courses will be taught by J. C. Wells, Professor of Phonetics at the University of London and President of the World Esperanto Association. Assisting Professor Wells will be a variety of noted Esperanto speakers, including Dr. Humphrey Tonkin, President of the University of Hartford. Participants may elect to take either course for non-credit or for one credit. The institute will be sponsored by the university's foreign language department. Information about fees and other details may be obtained from: Hilda Grossman, Director of Summer Programs, University of Hartford, West Hartford CT 06117, tel. (203) 243-4401.

Okazos 12-tagaĵ Esperanto kursoj en Norda Karolino. Unu estos ĉe Gaston College, 17-28 de junio; la alia estos ĉe Meredith College (situo de la ELNA Kongreso), 8-19 de julio. Por informoj: D-ro Stanley J. Drake, P.O. Box 2637, Gastonia, NC 28053, tel. (704) 864-7906.

La 3a Mezokcidentaj Esperanto-Kursoj kaj 4a Mezokcidenta Esperanto-Konferenco okazos ĉe Western Michigan University en Kalamazoo, MI, 8-13 de julio. La temo de la Konferenco estos: Direktoj por Esperanto—Loke kaj Nacie. Por informoj kaj aliĝilo: Sherry A. Wells, P.O. Box 1338, Royal Oak, MI 48068, tel. (313) 543-5297.

Esperanto-Klubo en urbo Senica, Ĉeĥoslovakio, organizos de la 21a de julio ĝis la 27a de julio 1991 la aranĝon Paroliga Semajno. Ĝi efektiviĝos en ĉarma urbo Senica. La kurso sekvas paroligi finlernintojn de skribkursoj por komencantoj, finlernintojn de A-kursoj kaj simile. Informojn postulu ĉe la adreso: Anna Hornáková, Hvězdoslavová 313/19, 905 01 SENICA, Ĉeĥoslovakio.

INTERNATIONAL NEWS

[The following are taken from UEA's series of news bulletins for external use. Feel free to copy these two pages for general distribution to your friends, neighbors, family, and other people interest in Esperanto—including local radio stations and newspapers.]

AN UPDATE ON ESPERANTO

The International Language Esperanto celebrated its hundredth anniversary in 1987, gaining unprecedented public attention in many countries around the world ... Its second century is already proving an eventful one, with social, political and economic change sweeping the relatively large Esperanto-speaking communities of Eastern Europe ... In the Soviet Union, where Esperanto was suppressed under Stalin and discouraged under Brezhnev, national and regional correspondence courses have attracted hundreds of thousands of participants, while organizations at the Soviet Level and in four of the republics have affiliated with the World Esperanto Association ... A travelling Esperanto instructor and organizer from Poland, Mr. Joachim Werdin, has helped to inspire the birth of fledgling organizations in Nepal, Thailand, Malaysia, Singapore and Taiwan ... From May to October 1990, the Chinese National Television broadcast a 24—part course in Esperanto throughout the country ... Established Esperanto associations in Pakistan, China, South Korea and Japan have set up a program of mutual assistance for the Asian region ... In July 1990, the opening of the 75th World Congress of Esperanto in Havana, Cuba, was attended by the State President Fidel Castro ... One of the fastest-growing national associations is that of the United States of America, which recently doubled its membership over a three-year period ... At the end of 1990, the first African conference of Esperanto was held in Notse, Togo ... The International Organization for Standardization (ISO) recently established category A liaison with the World Esperanto Association ... The International Academy of Sciences of San Marino, whose main working language is Esperanto, now has branches in Polish and Romanian universities and will be holding a special week-long session in Moscow, USSR, in January 1992 ...

MOSCOW CONFERENCE SIGNALS RAPID GROWTH OF ESPERANTO SCIENCE INSTITUTE

A further step in the expansion of the International Academy of Sciences San Marino (AIS) will be its first study session in the USSR, from December 29, 1991 to January 7, 1992. Since 1983 this international university, whose main working language is Esperanto, has regularly organized courses and lectures in various European countries. Until 1989 this occurred mainly at its headquarters in the Republic of San Marino; but since then the political changes in Europe have given a strong push to its development. By the end of 1989 an affiliate was functioning in Bialystok, Poland, and in May 1990, discussions with the government of Rumania led to full recognition of AIS diplomas in that country and the establishment of an affiliate in Sibiu. Recently AIS offices have been founded in Debrecen (Hungary), Athens (Greece), and Paderborn (Germany), site of the organization's Secretariat.

The Russian Session of AIS will be held in Moscow under the sponsorship of the Association of Workers in Science and Art "Mentor Cinema" and other scientific and cultural organizations, including the Soviet Committee for the World Decade of Cultural Development. The main program will consist of lectures, debates and "round tables" about many aspects of the subject "Language, Culture, Ecology." It will be preceded by a four-day Festival of Russian Art, in which well-known Esperanto-artists will also participate, and will be followed by a five-day program in Leningrad.

THE AFRICAN CONTINENT JOINS THE WORLD ESPERANTO MOVEMENT

"In Togoland a new era in the history of Esperanto has begun." This is how one participant in the First African Congress summed up his impressions. From December 28, 1990, through January 2,

1991, a hundred speakers of this international language met in the Togolese village of Notse to discuss its use and dissemination in Africa.

The African participants came from Togoland's neighboring countries (Benin, Côte d'Ivoire, Ghana and Nigeria). Togoland itself is one of several vigorous centers of Esperanto in Africa. The visiting Esperantists from Europe and the United States were struck by the youth and enthusiasm of the participants. "No one was more than 35 years old, nor had been acquainted with Esperanto for more than about eight years," noted Karl-Heinz Renschler of Germany. "But their language level was higher than at many other congresses that I've attended. The lectures and discussions were vigorous and interesting."

The Esperanto movement in Togoland enjoys the support of the national federation of UNESCO clubs and associations, whose representative spoke before the group. The Togolese government, too, through the Minister for Tourism and Ecology, hosted a delegation from the congress. Andrzej Grzebowski, director of the Polish tourist firm Esperantotur, took advantage of the occasion to discuss future visits by European esperantists to Togoland.

Besides vigorous discussions, for example about various religious attitudes in Europe and Africa, there were also cultural presentations including original plays written by Togolese Esperantists in Esperanto, and memorable group songfests. But the main topic of the congress was the evolution of Esperanto in Africa. In addition to an exchange of information among the West African Esperanto movements and general discussions of the topic, the congress adopted a resolution recognizing the existence of many language problems in Africa and calling on African governments to support the learning of Esperanto and its teaching in schools.

One of the most important emphases of the congress was the need for indepen-

dence of the African Esperanto movements, but at the same time for cooperation with other continents. As the representative of the sponsoring World Esperanto Association, Dan Maxwell (The Netherlands), explained: "The success of future congresses in Africa will depend in large part on the possible interest of non-African participants. The Africans are organizationally very competent, but they cannot by themselves finance such arrangements." The Benin Esperanto Association has already expressed its readiness to organize a second African congress next year. For the entire African movement the question remains of how Esperantists from other regions where the movement is strong, for example Zaire, Tanzania and Madagascar, can participate.

ROK' GAZET'—ESPERANTO'S SIX THOUSANDTH MAGAZINE?

Not only the youngest, but the most youthful—this is how the latest addition to the Esperanto press is characterized. We are speaking of *Rok' gazet'*, a magazine about rock music, produced by contributors in several countries with editorial headquarters in Donnevill, France. Number 1 appeared in February, 1991, and, surprisingly enough for those who believe that rock music exists only in English, its 28 pages are chock-full of news about popular music in Esperanto. From the addresses of the contributors, we can determine that Esperanto rock music is prospering in such disparate locations as Poland, Siberia, South Korea, Australia, Peru, Brazil, the United States and Zaire.

Rok' gazet' is the newest in a long line of Esperanto periodicals. Other new arrivals include a colored-picture magazine from the Vietnamese Information Agency, *Vjetnamio*, which started publication in 1990, and a modest bulletin for academic researchers about... periodicals in Esperanto! The editor of the latter, Dr. Árpád Máthé of Hungary, has so far uncovered the titles of 5,994 different magazines, bulletins and the like, which have appeared in or about the International Language. Because this was the result as of the end of September, 1990, the question can be asked: is *Rok' gazet'* perhaps the six thousandth Esperanto periodical?

Dr. Máthé points out that many of these periodicals had a short life. "Our researches show that the average lifetime was four and a half years. During the 101-year history of the Esperanto press, every six days an Esperanto periodical has appeared or disappeared!" The causes have often been financial, because the Esperanto movement has to depend for the most part on its members' money to publish and mail out its magazines. The language's first periodical *La Esperantisto* (1889-1895) died when tsarist censorship banned it from the Russian Empire.

Dr. Máthé and his colleagues have shown that there are more than 500 periodicals in Esperanto today. Many, of course, are relatively simple bulletins of associations and clubs; but more than 100 have an international clientele. Among these, the oldest is the International Esperantist Catholic Union's organ *Espero Katolika*, which has been appearing since 1903. The most widely read periodicals include the World Esperanto Association's magazine *Esperanto*, with more than six thousand subscribers in 100 countries, and *El Popola Ĉinio*, a 54-page illustrated magazine about mainland China published by the Chinese Foreign Language Publishing House. Other very popular magazines are *La Espero el Koreujo*, a private magazine from South Korea, *Monato*, an international equivalent of *Time*, and *Juna Amiko*, a magazine for students and other young pupils of Esperanto. There is an abundance of literary, scientific and special-interest periodicals, although these, of course, have smaller numbers of subscribers.

THE YEARBOOK OF THE ESPERANTO MOVEMENT DISPLAYS A FASCINATING WORLD

A new edition of the Yearbook of the World Esperanto Association appeared in the second week of March, 1991. This 400-page book, with its more than 80-year tradition, gives a fascinating picture of the complexity of today's Esperanto movement.

Founded in 1908, the Yearbook is one of the oldest Esperanto periodicals. Its aim has always been to facilitate contacts between people who have learned the language and want to use it for practical

purposes. It has given Esperanto speakers some advantages over speakers of even the largest national languages: In more than 80 countries it is possible to find the addresses of Esperanto-speaking individuals and organizations that are ready to help the traveller and the merely inquisitive person.

In the first pages we learn about the record number of individual members in the World Esperanto Association. This main international organization of Esperantists, which occupies the book's first 70 pages, has at the same time a record number of affiliated national Esperanto associations—50 in all, from every continent except Antarctica. The Association has consulting relations with the United Nations, UNESCO, the Council of Europe and several other international forums, and operates offices in Rotterdam, New York and Zagreb. The Yearbook gives information on all this, as well as about UEA's youth section, the World Esperantist Youth Organization, which has its own structure, annual global conference, and program.

The Yearbook dedicates 50 more pages to many different specialist and cultural activities. From Agriculture to Authors, Automobilists to Vegetarians, Atheists to Spiritualists, the speaker of Esperanto can find an organization for his profession, his interests and his belief. The San Marino Academy of Sciences organizes international courses and university-level diplomas; various scientific institutions study Esperanto. The Yearbook lists 13 radio stations which broadcast in Esperanto, and gives the addresses of a global correspondence service and no fewer than three international organizations for Esperanto-speaking children. Three pages are filled with a list of actors, musicians and other artists using Esperanto.

The majority of pages, 250, are dedicated to the Association's so-called "Delegate Network." Here we find the addresses of 2302 members of the Association in 72 countries who are ready to serve as a source of information and practical help to all 50,000 individual and affiliated members of the Association. The countries with the most delegates in 1991 are Brazil, Great Britain, Germany, France, Japan, The Netherlands and the United States.

OAZO DE ESPERANTO: VOKO AL SAMIDEANOJ!

de Brian Neil Burg

[Brian Burg, sudkalifornia advokato kaj membro de la Direktoraro de la Oazo de Esperanto, estas longtempa esperantisto.]

Lastjare io mirinda okazis en Esperantujo: s-ro J. Tilman Williams, la eksurbestro de Ĝardena Bosko (Garden Grove), Kalifornio, Usono, kaj grupo de samideanoj fondis senprofitan korporacion "Oazo de Esperanto", kies sola propraĵo estas 8-hektara (20-akrea) terpeco en la kalifornia alta dezerto, proksimume 222 kilometrojn (138 mejlojn) nordoriente de Los Anĝeleso, je la rando de urba civilizaĵo. Ĉi tiu terpeco estas la bonkora donaco de s-ro Williams.

Kiakiale? La ĝeneralaj celoj de Oazo de Esperanto estas, krei verdan oazon en la dezerto, oazon kiu ankaŭ estus internacia eduka kaj kultura centro, kaj estontece-direktita modelo por la tuta homaro—kun nia amata lingvo kiel la centra temo. Ĝi estu loko kie esperantistoj povus renkontiĝi aŭ kongresi aŭ nur ripozi kaj mediti; kie ne-esperantistoj povus lerni la lingvon kaj studi nian internacian kulturon kaj historion. Tia estas la ĝenerala skizo de nia vizio.

Sed ni nun staras ĉe la pordo de granda projekto. Ni havas ĝeneralan koncepton sed ne la detalan planon aŭ la sperton por ĝin efektiviĝi. Kiel krei el dezerta terpeco veran oazon? Estas instigego al la spirito kaj animo de ĉiu esperantisto.

Unuapaŝe, ni serĉu talenton kaj kapablon inter ni samideanoj. Ĉu inter vi, karaj legantoj, ekzistas arĥitektoj, desegnistoj, spertuloj pri konstruado? Tiajn ni bezonas por materialigi nian vizion.

Ni pensu grande nun. Je ĉi tiu horo ni serĉas specifajn proponojn—eĉ detalajn planojn—kiel efektiviĝi la revon. Se ni havus bonan planon, mon- kaj rimed-helpo venos. Ĉi tiu artikolo estu palpilo provante la interesojn, kapablojn, fortojn kaj sintenojn de Esperanto-parolantaj futuristoj ĉirkaŭ la mondo.

Kun la antaŭdirita enmense, ni volas plue instigi vin kun la jenaj gvidlinioj:

(1) Nia vizio estu estonteca modelo por

la mondo. Per tio ni intencas, ke ne nur pri Esperanto, interkomunikado, reciproka interkultura respekto kaj kunlaboro temu, sed ankaŭ, ke la fizika strukturo reflektu la 21-an jarcenton por la homaro de "Kosmoŝipo Tero". Ni faru ekologian kreitaĵon. Ni uzu renovigeblajn rimedojn. Ni efike utiligu la lokajn naturarojn: sunpovon, ventpovon, kaj tiel plu. Ni recikladu kiom eble plej multe.

(2) Ni faru "la plejon per la malplejo", kiel diris filozofo-futuristo R. Buckminster Fuller, inventisto de la geodezia volbo, la plej ekonomia kaj forta strukturo por kovrado de grandaj spacoj. Ĉu geodeziaj volboj taŭgos en Oazo de Esperanto?

(3) Ni volas veran oazon: ripozejon for de la premoj kaj maltrankvilaĵoj de la ekstera freneza mondo—sed ne temas pri atavismaĵo de primitivaj tempoj. Ni celas estontecaĵon kiu montros la vojon al la cetero de la mondo. Ni minimumigu la trudon je la medio. Kiom eble plej ni ne venenigu ĝin. Nia oazo estu energi-efika kaj en harmonio kun la tero.

(4) Ni uzu indiĝenajn plantojn por la ĝardenigo de la tereno.

(5) La Oazo de Esperanto estu juvelo ornamanta nian amatan teron: ĝi komplementu kaj komplimentu ĝin!

Ĉu iuj el vi estas spertuloj pri tiaj aferoj? Ĉu ekzistas inter ni arĥitektoj aŭ aliaj profesiuloj kiuj scipovas kaj kapablas efektiviĝi niajn celojn? Kiuj el vi komprenas kiel efike utiligi la naturajn temperaturajn regilojn de la tero aŭ de la sezonoj? Kiuj el vi komprenas pasivan sunhejtadon kaj malhejtadon? Aŭ subteran aŭ parte subteran konstruadon (por uzi la teron mem kiel naturan izoladojn)? Kiuj el vi scipovas konstrui geodeziajn volbojn? Desegni reciklado-sistemojn? Ni serĉas la internajn fortojn de Esperantujo.

Jen kelkaj aliaj faktoj kiuj helpas vin je via cerbumado:

(1) Ekzistas akvo subtera: la terpeco apudas la Riveron Mojave ("mo-HA-vi"). Kvankam ĝi preskaŭ ĉiam sekas sur la surfaco, subtera akvo sufiĉe abundas (sub proksimume 18 metroj).

(2) La alteco estas 677 metroj (2 220

futoj).

(3) Elektropovo haveblas ĉe la perimetro.

(4) La nunaj dimensioj de Oazo de Esperanto estas 201 metroj oble 401 metroj (660 futoj oble 1 320 futoj).

(5) Apuda terpeco de 73 hektaroj (180 akreoj) ankaŭ estas posedata de s-ro Williams, kaj li konsideras pluajn donacojn al Oazo de Esperanto, se ĝi vere efektiviĝos.

(6) La loko situas nur du horojn for de Los Anĝeleso per aŭtomobilo; ekzistas pavimitaj vojoj preskaŭ ĝis la terpeco mem, kaj nepavimita vojo dum nur mallonga distanco.

Ni plue demandas vin, karaj legantoj-spertuloj-profesiuloj, kiajn kaj kiom da konstruaĵoj bezonas ni? Ni jam pensas pri akceptejo/informcentro, instruĉambroj, loĝejoj, kuirejo kaj manĝejo, biblioteko, muzeo (la dezerto estas bona loko por konservi malnovajn librojn kaj antikvaĵojn!), distrejoj/ludejoj, teatro, komunikado-centro kun satelitotelero, reciklado-centro, parkejo kaj ĝardenoj. Ĉu aliaj taŭgas? Diskonigu viajn pensojn!

Ni serĉas difini kaj enkarnigi nian ĝeneralan vizion. Ni bezonas specifan planon kaj spertan scipovon. Ne oftas, ke sufiĉe granda terpeco haveblas por Esperantaj kaj interpopolaj celoj. Tio nepre estu inspiro al ni ĉiuj por kunfandi niajn proprajn fortojn kaj kapablojn por konstrui monumenton al la plej altaj idealoj de la homa spirito.

Do, resume, nia Oazo de Esperanto estu interesa, alloga, eduka, kultura, estonteca, mondcentro en harmonio kun la tero kaj la homaro, verda stelo por Esperanto kaj la 21-a jarcento.

Kontribuu viajn pensojn kaj viajn spertojn. La estonteco estas en niaj manoj. Oazo de Esperanto ne estu nur revo: ĝi estu devo! Partoprenu!


Ĉiun respondon bonvolu sendi al Oazo de Esperanto, P.O. Box 1538, Garden Grove, CA 92642, Usono. La plej bonaj sugestoj meritis specialan mencion sur la eventuala "Muro de Kontribuantoj" kiu nepre ornamos la ĉefkonstruaĵon.

REALIGU LA REVON!

CALENDAR

The calendar is a list of a few Esperanto-oriented events, regional, national and international, that we think would be of interest to some or all of our readers. For your information, we include the primary language(s) of each event. Where known, telephone numbers include national and area codes in parentheses; to direct-dial to any national code but 1, prefix with 011.

- 9-10 May 1991:** International Conference "Railways on the Threshold of the 3rd Millennium" in Brno, Czechoslovakia. Czech, Slovak, English, Esperanto (simultaneous translation). For information: Dr. Petr Chrdle, VUZ-Fervoja Esplorinstituto, U Luzickeho seminare 3, CS-11857 Praha 1, Cefoslovakio.
- 10-12 May 1991:** Northern California Senkrokodiliga Weekend at Point Bonita YMCA on the Marin Headlands north of the Golden Gate. Subject: "Esperanto Periodicals." Esperanto. For information: Ligo de Orient-Golfaj Esperantistoj, P.O. Box 324, Berkeley, CA 94701-0324, tel. (415) 770-1452.
- 11-18 May 1991:** 43rd Conference of the International Federation of Esperantist Railway Workers in Brno, Czechoslovakia. Esperanto. For information: Dr. Petr Chrdle, VUZ-Fervoja Esplorinstituto, U Luzickeho seminare 3, CS-11857 Praha 1, Cefoslovakio.
- 25 May-2 June 1991:** Esperanto courses, parties, meetings, excursions for beginning, intermediate and advanced students in the Ariège-Pyrenees of southern France. Esperanto. For information: M.J.C. Esperanto de E. Lasserre, 8 rue des Ecoles, F-09600 LAROCHE d'OLMES, France.
- 10-15 June 1991:** One-week beginning, continuing and conversational Esperanto courses at the Karlskoga Folkhögskola in Sweden. Esperanto. For information: Karlskoga Popola Altlernejo, Box 192, S-691 24 KARLSKOGA, Sweden, tel. (46 0586) 503 60.
- 15-16 June 1991:** Springtime meeting of the Quebec Esperanto Society in "Sainte-Catherine-de-Hatley." Esperanto. For information: Esperanto-Societo Kebekia, 6358-A rue de Bordeaux, MONTREAL, Quebec H2G 2R8, Canada, tel. (514) 272-0151.
- 17-28 June 1991:** Esperanto course at Gaston College, North Carolina. Esperanto and English. For information: Dr. Stanley J. Drake, PO Box 2637, Gastonia, NC 28053, tel. (704) 864-7906.
- 17-30 June 1991:** International Meeting of Friends. Non-mandatory program: courses, guided conversation, walks, excursions, recreational evenings. Esperanto. For information: Kultura Esperanto-Domo Grésillon, F-49150 BAUGÉ, France, tel. (33) 41 89 10 34.
- 1-8 July 1991:** Seminar for Czech-Method Teachers. Seminar A: Course for beginners, practice, excursions, recreational evenings. Esperanto. For information: Kultura Esperanto-Domo Grésillon, F-49150 BAUGÉ, France, tel. (33) 41 89 10 34.
- 1-19 July 1991:** Summer Esperanto Workshop at San Francisco State University, San Francisco, CA. English and Esperanto. For information: Cathy Schulze, 410 Darrell Road, Hillsborough, CA 94010, tel. (415) 342-1796.
- 2-11 July 1991:** Scout campout Skolto '91 in the Beskidy Mountains of southern Poland. Esperanto. For information: Carola Antskog, Källkullen, SF-25700 KIMITO, Finland, tel. (358 25) 3146, or Georgo Handzlik, ul. Braterska 41, PL-43-346 BIELSKO-BIALA, Poland.
- 6-11 July 1991:** Midsummer Esperanto Meeting in the forest community of Rautavaara, Eastern Finland. Beginners and Advanced Esperanto Courses, lecture series, hiking and bicycling. Esperanto. For information: Esperanto-Klubo de Helsinki, Pengerkatu 18 A 86, SF-00500 HELSINKI, Finland.
- 6-14 July 1991:** Europe-Asia-91 Conference in Sverdlovsk (Ekaterinburg), USSR. Subject: East-West, What Differences and What In Common? Esperanto. For information: SU-620077 Sverdlovsk 77, ab. ja. 67, USSR, fax (3432) 22 23 46 Esperanto, Telex 411855 Forum SU Esperanto.
- 8-13 July 1991:** 3rd Midwest Esperanto Classes and 4th Annual Midwest Esperanto Conference at Western Michigan University. Conference theme: Directions for Esperanto—Local and National. Esperanto and English. For information: Sherry Wells, POB 1338, Royal Oak, MI 48068, tel. (313) 543-5297.
- 8-19 July 1991:** Esperanto course at Meredith College, North Carolina. Esperanto and English. For information: Dr. Stanley J. Drake, PO Box 2637, Gastonia, NC 28053, tel. (704) 864-7906.
- 9-22 July 1991:** Lectures and Courses: "The History of Europe Through the Works of Julio Baghy and Kalman Kalocsay". Esperanto. For information: Kultura Esperanto-Domo Grésillon, F-49150 BAUGÉ, France, tel. (33) 41 89 10 34.
- 14-19 July 1991:** 51st Spanish Esperanto Congress, La Laguna, Canary Islands. Esperanto. For information: Esperanto, Apartado de Correos 53, D.p. 38200, LA LAGUNA, Tenerife, Spain.
- 20-25 July 1991:** 39th Annual Conference of the Esperanto League for North America, Meredith College, Raleigh, NC. Esperanto. For information: ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530, tel. (415) 653-0998.
- 20-26 July 1991:** 47th International Youth Congress of the World Esperantist Youth Organization, Karlskoga, Sweden. Subject: World Movements. Esperanto. For information contact La 47-a IJK, Box 4532, S-102 65 Stockholm, Svedio.
- 21-27 July 1991:** Speaking Week in Senica, Czechoslovakia. Beginners and advanced students with reading/writing knowledge will be introduced to spoken Esperanto. Esperanto. For information: Anna Homáková, Hviezdoslavová 313/19, 905 01 SENICA, Czechoslovakia.
- 23 July-5 August 1991:** Learn and Practice I: "The Art of Translating". Presented by George Lagrange. Esperanto. For information: Kultura Esperanto-Domo Grésillon, F-49150 BAUGÉ, France, tel. (33) 41 89 10 34.
- 27 July-3 August 1991:** 76th World Esperanto Congress, Bergen, Norway. Esperanto. For information contact UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ ROTTERDAM, The Netherlands, tel. (31 10) 436 10 44.
- 6-19 August 1991:** Learn And Practice II. Courses, guided conversation, excursions, recreation. Esperanto. For information: Kultura Esperanto-Domo Grésillon, F-49150 BAUGÉ, France, tel. (33) 41 89 10 34.
- 12-17 August 1991:** One-week Esperanto Institute at the University of Hartford, CT. Instructor will be Dr. John C. Wells. Esperanto and English. For information: Hilda Grossman, Director of Summer Programs, University of Hartford, West Hartford CT 06117, tel. (203) 243-4401.
- 20 August-2 September 1991:** End-of-Summer School. Courses, guided conversation, excursions, recreation. Esperanto. For information: Kultura Esperanto-Domo Grésillon, F-49150 BAUGÉ, France, tel. (33) 41 89 10 34.
- 26 August-18 October 1991:** Esperanto course for beginners at the Karlskoga Folkhögskola in Sweden. Esperanto. For information: Karlskoga Popola Altlernejo, Box 192, S-691 24 KARLSKOGA, Sweden, tel. (46 0586) 503 60.
- 6-8 September 1991:** Conference of the Intermountain Esperanto Group in Yellowstone National Park. Esperanto. For information: Rikardo Ranc, 20 Highland Road, Brentwood, NY 11717.
- 21 October-20 December 1991:** Continuing Esperanto course at the Karlskoga Folkhögskola in Sweden. Esperanto. For information: Karlskoga Popola Altlernejo, Box 192, S-691 24 KARLSKOGA, Sweden, te. (46 0586) 503 60.
- 7 January-6 March 1992:** Esperanto course for beginners at the Karlskoga Folkhögskola in Sweden. Esperanto. For information: Karlskoga Popola Altlernejo, Box 192, S-691 24 KARLSKOGA, Sweden, te. (46 0586) 503 60.
- 11-19 January 1992:** 28th Australian and 57th New Zealand Esperanto Congress, at the University of West Sydney. Esperanto. For information: S-ro Les Scott, 34 Ocean Road, Manly, N.S.W. 2095, Australia.
- 16 March-15 May 1992:** Continuing Esperanto course at the Karlskoga Folkhögskola in Sweden. Esperanto. For information: Karlskoga Popola Altlernejo, Box 192, S-691 24 KARLSKOGA, Sweden, tel. (46 0586) 503 60.
- July 1992:** 48th International Youth Congress of the World Esperantist Youth Organization, Czechoslovakia. Esperanto. For information contact TEJO at the address of UEA.
- July 1992:** 77th World Esperanto Congress, Prague, Czechoslovakia. Esperanto. For information contact UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ ROTTERDAM, The Netherlands, tel. (31 10) 436 10 44.
- 17-22 August 1992:** 5th Pacific Esperanto Congress, Huanghai Hotel, Qingdao, China. Esperanto. For information: Esperanto Travel Service, 6104 LaSalle, Oakland, CA 94611, tel. (415) 339-2001.
- July 1993:** 49th International Youth Congress of the World Esperantist Youth Organization, Catalonia or Italy. Esperanto. For information contact TEJO at the address of UEA.
- July 1993:** 78th World Esperanto Congress, Valencia, Spain. Esperanto. For information contact UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ ROTTERDAM, The Netherlands, tel. (31 10) 436 10 44.
- July 1994:** 50th International Youth Congress of the World Esperantist Youth Organization, Korea (South). Esperanto. For information contact TEJO at the address of UEA.
- July 1994:** 79th World Esperanto Congress, Seoul, Korea (South). Esperanto. For information contact UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ ROTTERDAM, The Netherlands, tel. (31 10) 436 10 44.
- July 1995:** 51st International Youth Congress of the World Esperantist Youth Organization, Finland. Esperanto. For information contact TEJO at the address of UEA.
- July 1995:** 80th World Esperanto Congress, Tampere, Finland. Esperanto. For information contact UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ ROTTERDAM, The Netherlands, tel. (31 10) 436 10 44.



LETEROJ

[Note: The letter column is a free-speech forum for members of ELNA. Views expressed are not necessarily those either of the editor or of the Esperanto League for North America, Inc.]

[Eble lokaj grupoj aŭ unuopuloj (prefere junaj) povos respondi al ĉi tiu apelo de najbarlanda junulara societo.]

En la nomo de HEJA [Haitia Esperantista Junulara Asocio] mi salutas vin. En Haitio, ni multe laboras por konigi Esperanton en Haitio. Mi partoprenis al la UK kaj IJK en Kubo. Dum la venonta monato, mi donos kurson de Esperanto por komencantoj, sed ni havas multajn ekonomikajn problemojn. Ĉu via asocio povos helpi nin por aĉeti kelkajn kursmaterialojn en Francujo?

Luzincourt F. Adrien
34, rue Joseph Janvier
Port-au-Prince, Haitio

Tri aferoj pri *Esperanto U.S.A.* Ĉu ne eblas aktualigi la daton de ĉiu eldono? Nuntempe la revuo estas eldonita je la fino de monato kaj prenas la eldonadon de tiu monato. La revuo ne estas ricevita ĝis la posta monato kaj ŝajnas malaktuala.

Due: mi ĝuis viajn recenzojn en n-ro 7, speciale tiuj pri la komputaraj vortaroj. Ĉu vi povas informi min pri la prezoj kaj adresoj de la vendistoj? Antaŭdankon. Ankaŭ en postaj recenzoj, mi sugestas ke tiu informo estu enhavigita.

Trie: persone mi subtenas la eldonadon de artikolo(j) pri ELNA kaj EANA/UEA, speciale se la artikolo donas la vidpunktojn de ĉiuj. Mi kredas ke tro multe okazas hodiaŭ, ĉar oni aŭ ne scias aŭ ne memoras kio okazis hieraŭ.

Edwin C. Harler Jr.

[La numeroj sur la revuo rilatas ne al difinita monato sed al la loko de la revuo en la jara sinsekvo. Por 1991 nia celo estas, ke la fina numero estu finredaktita en novembro kaj ekspedita en decembro, por trafi la legantojn jam en januaro. Se sufiĉe da homoj montras intereson pri la komputilaj vortaroj, ili sendube aperos ĉe ELNA; intertempe, ambaŭ estas haveblaj ĉe la UEA-Libroservo. Pri la iamaj rilatoj inter ELNA, EANA kaj UEA mi iom timas aperigi artikolojn, sed... kion opinias vi, la leganto? S-ano Harler ja pravas, kiam li sendepende eĥas la penson de Santayana, ke "kiuj ne lernas de la historio, tiuj nepre ripetos ĝin".]

I read with interest your editorial in the 1990(7) edition of the newsletter. The news release from Chicago [about Esperanto at the MLA] was printed in the LeMars Daily Sentinel where I saw it. I wrote a letter to the editor who published it. However, they still didn't get the example of Esperanto entirely correct.

No one responded to my offer to help them learn the language.

It seems so obvious to me that Esperanto should be taught in schools everywhere! But how to arouse the interest!

Henrietta L. Kroll

[What is "obvious" and "logical" to you and me may be less so to people whose ideas of what should be taught in school are not predicated upon ideals such as "ease of learning" or "linguistic justice."]

In contrast to the alleged fiasco of the recent Modern Languages Conference at which "Esperantists gathered only to hear each other's papers":

I have paid my dues—literally and figuratively—at the Michigan Foreign Language Association for 4 years, even though I'm a lawyer, not a language teacher, by profession. I am self-employed, so I was able to give myself the days off to attend (without pay, bedaŭrinde).

My name was listed in their directory with Esperanto as my language. Only one other semi-Esperantist was there the first year, and the second year included a student of mine.

I set out Lesson 1 of the correspondence course, which one teacher picked up and photocopied for her whole elementary class—they were delighted that teacher was learning right along with them!

I submitted two pages for the newsletter—an article on Esperanto's use as an introduction to language learning with fact sheet and notice about our first Midwest classes—they printed it.

Year #3 I asked and was approved to give a one-hour session about Esperanto. 22 non-Esperantist teachers showed up—several very enthusiastic about how it would be a guaranteed success experience for their students. I promote it as the best thing that could happen to help foreign language teachers as it can encourage students to want to study other languages, especially those in the lands of their Esperanto pen-pals.

October, 1990, I was approved to give a

3-hour workshop to which 10 persons paid an extra fee to attend and for which I was paid a good stipend for teaching!

So there!

Sherry A. Wells

[Don't tell me, tell that lady at the Chicago Tribune!]

[Malofte aperas okazo uzi la leterrubrikon por reklami libron en la ELNA Libroservo...]

Mi sendas ankaŭ kopion de artikolo pri *Nudpieda Gen*, kiu aperis en la anglalingva tagjurnalo *Mainichi Daily News* en 1990 nov. 3. Ĝi nur mencias, ke la libro estis tradukita ankaŭ en Esperanton. Sed la artikolo estas interesa. Tiu libro instruis al mi pli pri Japanio antaŭ mia alveno, ol io ajn alia. Mi legis ĝin unue angle, poste Esperante, kaj poste, kiam aperis la dua libro, ankaŭ tion angle. En Japanio, mi aĉetis ĉiujn naŭ librojn japanlingvaj, sed legi ilin estas alia afero...

Joel Brozovsky

[Ĉe la ELNA Libroservo: *Nudpieda Gen*, kodo NUD001, prezo \$9.95 (nemembroj) \$7.95 (membroj).]

[Jen reago el Sovetunio.]

Dank'al publikigo de mia letero en la revuo "E USA" [1990(5)] mi ricevis kelkajn reeĥojn el via lando kun kiuj mi jam interŝanĝis po 2-3 leterojn. Unu el tiuj korespondantoj sendis al mi afable du ekzemplerojn de via revuo kaj mi interesate konatiĝis kun la enhavo kaj trovis la revuon interesa, eble iom tro serioza.

Hieraŭ mi ricevis leteron de unu el miaj plej bonaj lernantoj Petr Braĵnikov, kiu ĝoje informis min, ke li ricevis de vi personan respondon. Li estis tiom feliĉa, ke mi opinias—esperantista movado ekhavis ankoraŭ unu fidelan adepton. "Ni semas kaj semas...!"

Viktor Kudrjavcev

Sovetunio

[Nomoj kaj adresoj de dek pliparte junaj gelernantoj de s-ano Kudrjavcev troviĝas en la rubriko "Volas Korespondi".]

[Jen informpeto el Pollando. Ĉu povas helpi iu ELNAano?]

Mi estas 21-jara studentino de pedagogiko kaj interesas min laboro de "Lernejo de vivo" (lernejo por infanoj kun psikaj malfruigoj). Ĉu en via lando laboras "Lernejoj de vivo"? Se jes, kiel ili laboras? Mi interesiĝas ankaŭ pri tio, kiajn testojn, enketojn, demandarojn uzas viaj pedagogoj kaj psikologoj. Mi estus feliĉa se mi povus ricevi esperantlingvajn ekzemplojn kun instrukcio. Eble iu povus priskribi al mi plej popularajn en Usono pedagogludojn por infanoj.

Iwona Kaczor

ul. Zahadzkiego 22/129
43-100 TYCHY
Pollando

Dankon pro via tre alloga reklamo pri nia 1991a EGIa Konferenco en [Yellowstone] Nacia Parko.

Ĝi tuj portis rezultojn! NeEGianoj kiuj tamen loĝas en la EGIa regiono kontaktis min. Povas esti eĉrimedo per kiu l' anaro de EGI kreskos! La konferencoj estas ĉiuj tre entuziasmaj kaj tre bonaj esperantistoj talentaj, tiel ke mi anticipas tre bonan tempon.

Tamen mi nevolonte donis la impreson, ke estas tro malfrue por aliĝi. Se eble bonvolu korekti tiun impreson. Mi povas teni kelkajn spacojn en rezervo por tiuj, kiuj decidis aliĝi poste. Mi povas fari tion dank' al la membroj kiuj aliĝis frue. Ili provizis la deponmonon. Tamen mi ne povas teni la ĉambrojn rezervitaj ĝis la lasta momento.

Rikardo Ranc
20 Highland Road
Brentwood, NY 11717

Mi sincere gratulas vin pro la pliboniĝo de la ELNA novaĵletero.

Nur pri unu ero mi volas atentigi vin. Estas pri la artikolo "Altar Esperanto" ["Newsbriefs", 1991(1)]. En parto vi bone malkaŝis la enhavon, tamen la gravan anoncon vi maltrafis. Pro tio, mi sendas al vi pli da informoj pri la finfina akcepto fare de la Papo de la Katolika Meso en Esperanto.

Mi petas, legu detale kaj eble en la venonta novaĵletero de ELNA vi povas pli taŭge prezenti la veran signifon de ĉi tiu

"paŝo" inter precipe la katolikaj esperantistoj kiuj vere celebris ĉi tiun sukceson post multe da laboro. Ni ĉiuj celas la akcepton de la internacia lingvo Esperanto!

Alberta Casey

[*Laŭ la teksto sendita de s-anino Casey, oni nun rajtas celebri en Esperanto la Sanktan Meson aŭ la Liturgion de la Vorto, escepte de la cerebro de la Sakramentoj kaj de la aliaj liturgiaj ritoj, sub difinitaj kondiĉoj, nome ke devas temi pri Esperanto-kongreso (ne necese internacia) kaj koncernas nur la kongresanojn, ne lokajn esperantistojn. Antaŭ ol tio rajtos okazi, estas necese, ke la liturgiaj tekstoj en Esperanto estu konfirmitaj de la Sankta Seĝo, kaj verŝajne tio jam okazis.*]

Antaŭ kelkaj tagoj venis *Esperanto U.S.A.* Mi rigardis ĝin helpe de la lupeo, kaj trovis mian leteron al vi. Ankaŭ mi trovis la anoncon pri mia prelego al la Optimistoj-Klubo. Sed vi diris, ke mi prelegis en *Jefferson*. Tio ne estas vera. Mi prelegis en *Marshall*. Kiamaniere vi akiris la nomon *Jefferson*?

Mi volis sendi kopion de tiu anonco al la Optimistoj de *Marshall*, sed nun mi ne povas, pro la eraro. Domaĝe!

Roan Stone

[*Mi ne plu havas vian leteron, sed laŭ la anonco, kiu aperis en Raporto n-ro 40 de la Esperanto-Grupo Intermontara, vi ŝajne menciis en via letero, en alia kunteksto, pri "la urbeto Jefferson proksime al Marshall". Mi supozas, ke tial mi konfuziĝis pri la du. Mi pardonpetas pro la eraro, kaj en ĉi tiu numero ripetas la*

anoncon kun la ĝusta nomo, tial, ke vi povu doni ĝin al la Optimistoj en *Marshall*.]

[**El orienta Eŭropo, ĉiam io nova...**]

Kun plezuro ni sciigas vin, ke la 9-an de marto 1991 fondiĝis en nia lando "Albana Esperanto-Ligo", kun sidejo en Tirano. Anoj de la estraro estas: Gafur Muĉo (Prezidanto), f-ino Rita Permeti (Sekretariino), Vasil Pistoli (Ekstera agado), Luan Jaupi (Interna agado) kaj Shpetim Idrizi (Financoj).

Ĉi-tio estis multjara deziro de la albanaj esperantistoj, sed nur nun kreiĝis kondiĉoj. Sed niaj kondiĉoj materialaj, precipe la nunaj kiam nia lando travivas grandan krizon ekonomian, estas eldireblaj. Al ni mankas rimedoj kaj materialoj ĉiuspecaj. Kelkan malgrandan helpon donis aŭ promesis al ni eksterlandaj esperantistoj, kaj ni esperas al solidareco de ĉiuj samideanoj. Ni bedaŭrinde nun ne havas esperantaĵojn aŭ niajn aŭ alilandajn, sed tuj kiam kreiĝos kondiĉoj, ni povas sendi ilin ankaŭ al vi. Nun ni havas nur deziron, rajton agi kaj pretecon de niaj esperantistoj.

Ni salutus ĉion, kion vi povus fari por apogi nian Esperantan movadon. Ĉia via agado helpus nin treege.

En estonteco ni intencas eldoni librojn esperantigitajn el albana kaj revuon (aŭ bultenon). Sed kiam fariĝas tio, dependos de la plenumo de niaj bezonaĵoj.

Rita Permeti
p/a Gafur Muĉo
Rruga "Thanas Ziko" Nr. 56
TIRANA
Albanio

EL LA LIBROSERVO

Pro bedaŭrinda fuŝo, la sekvaj kvar libroj ne troviĝis en la listo en nia ĉi-jara librokatalogo. Provante iel ripari la eraron, jen ĉi-sube mallongaj priskriboj:

Diversaj: Anatomia nomenklatur. Kolekto de anatomiaj terminoj en kvin lingvoj: angla, ĉina, Esperanto, franca, latina. Dum en la unua parto la terminoj estas ordigitaj laŭ la korpopartoj—la latina (kun apude la alilingvaj sinonimoj) estas la ĉefa lingvo—fine de la libro ĉiuj terminoj estas alfabetorde listitaj por ĉiu lingvo. 1989, 697p. Bindita. Ĉinio. Kodo ANA001, prezo \$29.00 (nemembroj)/\$27.55 (membroj).


Diversaj: Atlaso de insekta morfologio. Ilustrita terminaro trilingva:

ĉina, Esperanto, latina. Utila por tiuj, kiuj okupiĝas pri insektiko. La unua lingvo en la ĉefa parto de la libro estas Esperanto, sed fine de la libro la terminoj estas alfabetorde listitaj en ĉiu lingvo. 1987, 454p. Bindita. Ĉinio. Kodo ATL001, prezo \$16.00 (nemembroj)/ \$15.20 (membroj).

Tavanti, Corrado, & Ertl, István: Tiu toskana septembro. La senviva korpo de junulino estas trovita en parko. Malkovri la murdinton ne estas facila afero, sed kiel kutime en tiaj literaturaĵoj ankaŭ tio okazas fine. 1990, 137p. Bruŝurita. Hungario. Kodo TIU001, prezo \$13.95 (nemembroj)/ \$13.25 (membroj).

Harrison, Harry: Verda estonteco, La. Elangligis Joy Davies. Esperanta versio de la sciencfikcia rakonto "The Greening of the Green". Dua eldono 1985, 16p. Broŝurita. Irlando. Kodo VER010, prezo \$2.75 (nemembroj)/\$2.60 (membroj).

Ionel Onet



RECENZE

Stimec, Spomenka: *Nesenditaj leteroj el Japanio*. Zagreb-Hukuoka: 1990. 65 p. Ĉe ELNA: Kodo NES002, prezo \$6.95 (nemembroj)/\$6.60 (membroj)

Tiuj kiuj renkontis en Japanio la multjare eminentan Esperanto-aktivulon el Zagrebo, Jugoslavio, verŝajne jam avida legis ŝian "vojaĝraporton". Tial, la jena recenzo celas la ceterajn esperantistojn, kiuj ne havas esperon trovi sian propran nomon sur la paĝoj.

Precipe en Esperantio troviĝas multaj homoj kiuj faras mirindajn vojaĝojn—kaj ne malmultaj kiuj verkas ian raporton pri la sperto.

Tiujn raportojn kutime legas la koncernatoj—tiuj kiuj renkontis la vaganton dum la vojaĝo—kaj malmultaj aliaj. Ja ne estas facile verki pri vojaĝo (aŭ ajna temo) raporton sufiĉe interesan por teni la atenton de nekonataj legantoj. Ĉar mi mem, kiel verŝajne multaj aliaj, revas pri verkado pri miaj propraj aventuroj en Esperantio, mi tralegis plurajn fuŝe tedajn raportojn, por ekscii kiel faris aliaj.

Jam de la unua alineo, mi konstatis, ke la

Nesenditaj leteroj de Spomenka Stimec estos diferenca. Sen enkonduko, ŝoke subite, la leganto ekkunvojaĝas al kaj tra Japanio, renkontante homojn kaj observante multajn interesajn erojn de tiu insula lando fremda al la aŭtoro.

La diferenco inter beletra verko kaj teda raporto estas la sperto de la leganto. Legante la *Nesenditajn leterojn*, oni ofte sentas sin tie, surloke en Japanio, kaj volonte oni plu legas por daŭrigi la sperton. Ne nur la aŭtoro, sed ankaŭ la leganto povas ĝui la aventuron.

Ne ekzistas aventuro sen risko, sen doloro. Tion bone scias ĉiu sukcesa verkisto de fikcio. En Hiroŝimo, pacmarŝo renkontas bruegan kontraŭpacan manifestadon. Kaj plu poste: "Survoje al... kortuŝa spektaklo, mi renkontas ankoraŭ foje senesperigan scenon de Hiroŝima...". Mi mem neniam ĉeestis la pactagajn eventojn en Hiroŝimo en la 6-a de aŭgusto, sed legante ĉi tiun priskribon, mi povas bone imagi erojn de ĝia eco, kvazaŭ rememoro de antaŭlonga sperto.

La ritmo de la verko restas komforta,

malrapideta—konvene al la sufokemalseka somervarmo kiun ankaŭ la leganto kvazaŭsentas.

Koboldoj ne regis, nek ignoris la eldonon. Certe ili ridis je la priludoj de mia nomo, kiu unu fojon enŝteliĝis en la libron—mislitere!

Taŭgas la titolo. Tiu ĉi verketo ne pretendas analizi Japanion, nek kroniki la aŭtoran vojaĝon. (Scii kion ellasi estas ne malpli grave, ol scii kion enmeti en verkon.) Ĝi estas serio de observoj kaj komentoj kungluitaj per iom da kronikado, prezentita en simpla kaj klara stilo kiu tuj kaptas kaj ĝis la fino tenas la intereson.

"Miloj da interpretadoj de Japanio ne klarigas ĝin. Ĉiu portas el ĝi sian, alian, sperton! La miaj, ĉu ĝuste, ĉu malĝuste interpretataj aldoniĝas al la mozaiko." Nu, fakte, ne ĉiun detaleton ŝi ĝuste interpretis, sed mi ne trovis gravajn misojn. Foje montriĝas profundeta, kvankam senpretenda, kompreno de eroj el la kulturo de tiu insularo en la nordokcidenta Pacifiko. Mi mem lernis per la libro pri ĉi tiu lando, kvankam jam preskaŭ tri jarojn ĝi estas mia hejmo.

Al mi, la miriga afero estas ke tiu ĉi vojaĝinto ne nur portas sian sperton, sed kapablas ĝin klare komuniki al legantoj tra la mondo!

Joel Brozovsky

[La supera recenzo unue aperis en *La Movado* #480, Feb. 1991, pĝ. 6-7. Ni reaperigas ĝin kun permeso de la verkinto.]

PASOJ

CORREA

La 6an de novembro 1990 forpasis longtempa samideano Affonso Henriques Correa en Fort Lauderdale, Florido. Naskiĝinta en Amparo, Brazilo en 1897, s-ano Correa venis al Usono en 1940 kiel rifuĝinto de la diktaturo de Getulio Vargas. Li laboris i.a. por la usona Ministerio pri Eksterlandaj Aferoj, la stabo de novjorka ŝtatestro Nelson A. Rockefeller, kaj la Organizo de Amerikaj Ŝtatoj antaŭ sia emeritiĝo en 1964. Li ankaŭ verkis pri la politika supreniĝo de Getulio Vargas definitivan studon, kiu aperis en Brazilo en 1961 en la portugala lingvo.

La energia kaj nelacigebla Correa verkis tre efikajn varbilojn favore al Esperanto, el kiuj kelkaj aperis en naciaj revuoj, kaj dank' al kiuj la vaŝingtona klubo siatempe vigliĝis. Semajnon post semajno li kaj lia edzino Katarino pretigis manĝaĵojn, dolĉaĵojn, kafon, teon, ktp por

la kunvenaj partoprenantoj. Li ankaŭ akiris permeson renkontiĝi kaj instrui Esperanton en la luksa kaj prestiĝa konstruaĵo de la Organizo de Amerikaj Ŝtatoj.

Laŭ nekrologoj de Sergio Docal kaj la Washington, DC, *Post* (Nov. 12, 1990)

LEWIN

La 20an de decembro 1990 forpasis Moshe Lewin. Moshe estis multjara ano de la Esperanto-Societo de Novjorko, ELNA kaj UEA. Li estis delegito de UEA en Bronx, kaj fakdelegito pri muziko. En la somero de 1990 li suferis apopleksion kaj devis resti en malsanejo dum pli ol kvar monatoj. Li finfine iris hejmen, sed post nur kelkaj semajnoj fine forpasis.

Informis *Novjorka Prismo*, Jan. 1991

METS

La 11an de februaro 1991 mortis pro koratako William (Vilĉjo) Mets, kiu

esperantiĝis kiam li estis junulo en sia naskiĝa lando Nederlando, sur la insulo Texel. Post sia emeritiĝo en 1975 (li estis presisto) li Esperante reaktiviĝis en Santa Barbara, Kalifornio (Usono). Ekde 1977 li plene partoprenis la Esperanto-Rondon de Santa Barbara; vaste korespondis kun eksterlandaj esperantistoj, aparte pri sia hobia filatelo; kaj ofte kontaktis esperantistojn dum siaj vojaĝoj en Eŭropo.

Je sia morto li estis la UEA-vicelegito por Santa Barbara kaj fakdelegito pri presado; la gvidanto de la loka dek-leciona perkoresponda kurso; kaj la kasisto por la Tut-Kalifornia Konferenco kiu okazis en Santa Barbara aprile. Lia vidvino Vivian (Vivinjo) Mets estas ankaŭ esperantisto. Krom ŝi postvivis lin filo, filino, kaj kvar genepoj, en Usono, kaj unu fratino, du nevinoj, kaj multaj aliaj parencoj en Nederlando.

Informis Dorothy Holland-Kaupp



VOLAS KORESPONDI

Amikeco trans lmoj

Noto: Nomojn kaj adresojn ni prezentas dikliteraj; familiaj kaj urbaj nomoj estas MAJUSKLAJ. Komojn ni uzas por montri ŝangon inter linioj en adreso.

BHARATO

[*Inter okcidentanoj, la tradicia nomo de Bharato estas "Hindio" aŭ "Hinda Unio"*]
Arun Kumar BHATTACHARYYA, 151 B.B. Salt Lake City, CALCUTTA-700-064. 48-jara oficisto en registara Departemento de Juto-Eksporto, interesiĝas pri internacia komerco, ludas kontrakt-brigon, ankaŭ pretas gastigi geamikojn-vizitantojn.

BULGARIO

Ilna ILIEVA, p/a Adriana K. Berberova, Tri usi 12/A, BG-2500 KJUSTENDIL. 13-jara knabino, ŝatas sporton, lernadon, ŝakon.

Dimitar TODOROV, kv. "Miĥail Ivanov" ul. "Iskra" No. 8a, 9000 VARNA. 21-jara maŝinisto de lokomotivoj, interesiĝas pri Esperanto, geografio, antikva historio.

Emilia IVANOVA, 9700 SUMEN, odrin 9 bl. 2 vh. A ap. 16. 24-jara fraŭlino, ŝatas muzikon, historion, jogan gimnastikon, povas korespondi ankaŭ angle aŭ ruse sed preferas Esperanton.

HUNGARIO

BALOGHNÉ Szucs Judit, 1156 BUDAPEST, Páskomliget u. 58.I.9. 36-jara ĵurnalistino, eksedzino kun tri gefiloj, ŝatas lerni, legi, vojaĝi, interesiĝas pri ĉio usona, pri klasikmuziko, kaj pri metalrokmuziko.

JUGOSLAVIO

Sladaua VISUJIC, Ilumska 24, 72000 SARAJEVO. Lernanto en baza lernejo, interesiĝas pri filmoj, teatro, muziko, sporto.

KAMPUĈIO

HONGLY-PHORN, 21Elz Rue 140 group 62, Section Monorom Khan 7 Makara, PHNOM PENH. 19-jara lernanto, volas korespondi kun usonanoj.

NEPALO

Dipendra Kumar PIYA, G.P.O. Box 4098, KATHMANDU. 22-jara studento, interesiĝas pri literaturo, muziko kaj teatro.
Narendra MANANDHAR, kha-3 121, Nhubahal, Chikanmugal Tole, KATHMANDU.
Rabindra ROY, kha-2 783, Om Bahal Tole, KATHMANDU.

NIGERIO

AHAMEFULE Anayochukwu, P.O. Box 80

Enyiogugu PO, MBAISE OWERRI, Imo State. Kvarajarulo en mezlernejo, interesiĝas pri sciencoj.

POLLANDO

Magda KIJAK, Zymirskiego 5 m 43, 04-045 WARSZAWA. 16-jara virino, interesiĝas pri navigado, teatro kaj biologio.

Iwona KACZOR, ul. Zahadzkiego 22/129, 43-100 TYCHY. 21-jara studentino de pedagogiko, interesiĝas i.a. pri historio, muziko kaj sporto, interŝanĝos bildkartojn kaj poŝtmarkojn.

Grzegorz POKRZYWNICKI, ul. J. Iwaszkiewicza 2/B/10, PL-81-516 GDYNIA-KARWINY. Viro, interesiĝas pri turismo kaj geografio, kolektas bildkartojn.

RUMANIO

[*(*) indikas, ke tiu venis el listo sendita de Vasile Albu.*]

*Cristina MOTRUNA, str. Rahovei ap. 5, 2400 SIBIU. 18-jara virino, kun ĉiuj landoj pri ĉiuj temoj.

*Iuliana DICU, Trivale Bl. 90 Ap. 21, 0300 PITESTI. 18-jara virino, kun ĉiuj landoj pri ĉiuj temoj.

*Patricia MARCU, str. Teilor 30, 2400 SIBIU. 19-jara virino, kun ĉiuj landoj pri ĉiuj temoj.

*Elena MUNTEAN, str. Deva 47, 2400 SIBIU. 20-jara virino, kun ĉiuj landoj pri ĉiuj temoj.

*Bogdan FLOREA, str. Rahovei 14 Bl. 12 Ap. 13, 2400 SIBIU. 20-jara viro, kun ĉiuj landoj pri ĉiuj temoj.

*Elena DINCA, Trivale Bl. 90 Ap. 2, 0300 PITESTI. 20-jara virino, kun ĉiuj landoj pri ĉiuj temoj.

*Teodora NEAG, 2468 ACILIU, nr. 299, jud. Sibiu. 21-jara virino, kun ĉiuj landoj pri ĉiuj temoj.

*Ciprian RAULEA, str. V. Alecsandri 15, 2400 SIBIU. 23-jara viro, kun ĉiuj landoj pri ĉiuj temoj.

*Mihaela BUCUTA, str. Cugir 7, 2400 SIBIU. 23-jara virino, kun ĉiuj landoj pri ĉiuj temoj.

*Rodica FLORESCU, str. Muncel 5 ap. 15, 2400 SIBIU. 29-jara virino, kun ĉiuj landoj pri ĉiuj temoj.

SOVETIO

[*Korespondantojn el Sovetio ni laŭeble aranĝas laŭ la respubliko, el kiu ili venas.*]
[*] indikas nomon sur listo sendita de Viktor Kudrjavcev.]
Belorusio

*Dmitrij KULŜA, Asanalieva 8-123, SU-220024 MINSK. 15-jara viro, interesiĝas pri korespondado, muziko.

Rusio

Saŝa BORJONOV, Marksa 19-21, SU-660097 KRASNOJARSK. 13-jara knabo, interesiĝas pri kino, libroj, humuro, kolektas remaĉadojn, kasedojn, glubildojn, poŝtmarkojn, kalendarojn.

*Katerina POTAPOVA, SU-678713 BAJAGA, Tattinskij r-n, Jakutskaja-Saha SSR. 14-jara virino, pri ĉiuj temoj.

*Anna BREJNEVA, L-Zavodskaja 2-1, SU-626607 SALEHARD. 15-jara virino, pri ĉiuj temoj.

*Sergej BUJANOV, Skolnaja 4-3, st. Voloĉaevka, Smidoviĉskij r-n, Habarovskij kraj. 15-jara viro, pri ĉiuj temoj.

*Ekaterina ILAKOVA, Lunaĉarskogo 12-102, SU-624300 KUŜVA, Sverdlovskaja obl. 16-jara virino, interesiĝas pri muziko, ĉiuj temoj.

*Svetlana JADINA, Zalinejnaja 16, st. Kolhoznaja, Petrovsk-Zabajkalskij r-n, Ĉitinskaja obl, SU-673140. 16-jara virino, interesiĝas pri muziko, sporto, dancoj, kalendarretoj.

BORISOV Oleg, Arĥangelskaja obl., SU-165400 g. KOTLAS-11, ul. Zapoljarnaja 23-20. 17-jara veldisto, kun usonanoj, kanadanoj, meksikanoj ktp, pri politiko, perestrojko, aliaj militoj, historio, geografio ktp, pasias al judo, literaturo.

Vladimir SAMOJLOV, Anadolrskij nr. 69-274, SU-129336 MOSKVA. 21-jara instruisto en inĝenierkonstrua instituto, interesiĝas pri vivmaniero, ĉiutaga vivo, konstruteknologio, hardroko.

Oleg STEBLOVSKI, SU-344093 ROSTOV NA DONU, ul. Tupoleva 19 kv 6. 25-jara programisto, amas vojaĝi, teatron, muzikon, aliajn, interesiĝas scii pri vivo, kutimoj, moroj de Usono.

BORZOVA Olga, ul. gen. Glagoleva d. 30 k. 1 kv. 29, SU-123585 MOSKVO. 27-jara maŝinistino de fotoelektraj maŝinoj, interesiĝas pri turismo, kino, kuirarto, ŝatas legi kaj vojaĝi.

*Gafur MANSUROV, Vosstanija 58-151, SU-620098 SVERDLOVSK. 28-jara juristo, interesiĝas pri eksteraj rilatoj.

*KASIMOV Firdaus, SU-620067 SVERDLOVSK, ab. k. 132. 32-jara konstruisto, interesiĝas pri vojaĝoj, Esperanto-instruado, aliaj temoj.

*Viktor KULAKOV, P.O. Box 19, SU-620043 SVERDLOVSK. 33-jara viro, interesiĝas pri programado, komputiloj, astrologio, joko, muziko.

Ljudmila KOSTINA, Box 77, SU-675000 u. B L A G O V E Ŝ C E N S K - c e n t r o , Amurskaja regiono. 44-jara radioteknikistino, interesiĝas pri aferoj de ekologio, eklezio, virinoj kaj infanoj, ŝatas eklezian kaj klasikan muzikon.

Uzbekio

*HUDAJKULOVA Dilbar, Tereŝkovoĵ 6., SU-730000 KARSI. 15-jara virino, pri ĉiuj temoj.

TOGOLANDO

SEGBEDSI Ekoue, B.P. 61 296, LOMÉ. 20-jara viro, prefere kun kalifornianoj.

LANGUAGE IN THE NEWS

[A new medical requirement for Filipino immigrants?]

Workers hastily pulled down a 30-foot banner intended for a ceremony at the San Jose, Calif., public library after discovering that a greeting in the main native Philippine language did not mean "you are welcome." It meant "you are circumcised."

[Newsday, undated; submitted by Rob Hardy]

[Trans-Baltic accent...]

Polish-Swedish cooperation to explore the needs and possibilities for cleaning up the Vistula River in Poland have come a cropper. Cultural differences and language problems were mentioned in explanation. It was decided that in future cooperation in the field of environmental purification English would no longer be used, but Swedish and Polish would be spoken, with interpreters.

[Monato, 1991/2, p. 6]

[Actually, the correct term is "Munchkin" ...]

Iraq's UN ambassador has answered a complaint from an African envoy that he had used the word "pygmy" in a derogatory manner. Ambassador Abdul Anbari said the correct translation of the Arabic word he had used to belittle Kuwait's representative was "dwarf." At an earlier meeting, Anbari had scorned Kuwaiti envoy Mohammad Abulhasan as "the pygmy who sits to my right." The phrase came from a UN translation. At Monday's closed-door meeting, according to a transcript released yesterday, Zaire's ambassador Bagbeni Nzengeya took exception and said his country's population of 36 million included 400,000 pygmies. "The size of a human being has never been a criterion for any scale of values," he said.

[Boston Globe, Feb. 2, 1991; submitted by Caroline Ellis]

[Where was US English when the lights went out?]

Dealing a blow to Puerto Rico's statehood movement, legislators [in San Juan] overwhelmingly approved a bill making Spanish the sole official language of this Caribbean island of 3.6 million inhabitants. The bill revokes the Official Languages Act of 1902, which designated both English and Spanish as the languages of the commonwealth government's business. Fewer than 25 percent of Puerto Ricans are fully bilingual in Spanish and English, and opponents of the Spanish-only measure said it would set back programs to extend English fluency. Statehood advocates claimed that the real purpose of the proposed law is to hurt Puerto Rico's chances of becoming the 51st state.

[San Francisco Chronicle, Mar. 6, 1991]

[Aktuale?]

According to a Reuters report of March 27, 1991, French actor Gerard Depardieu plans to file a libel suit for "a large sum" against Time magazine, for its recent publication of an alleged quotation by Mr. Depardieu to the effect that at age 9, "... he went along on his first rape."

Time magazine stated that the quotation was based on an interview conducted in French by a contract reporter. The Time piece was presumably then edited from an English translation of the interview. In defense of Depardieu's charge, a Time spokesman said that the actor had confirmed that he had "participated in" the rape; but the verb used in the French interview was "assister à," which can mean no more than "witness," "attend" or "be present at."

One might suppose that the translator, either overlooking the vital "à" or not too familiar with the many "false friends" in translating French to English, changed Depardieu's statement that he had "been present at a rape" to having actually perpetrated or participated in it. That could be a very costly error for Time magazine and for the actor's reputation!

[Reported by William R. Harmon]

daŭrigata de paĝo 1

membroj kaj "Friends of Esperanto" kontraŭ \$3.00 por la serio, kaj al aliaj personoj kontraŭ \$4.00; post tiu jarfino, ELNA senpage provizu la serion al tute novaj membroj kaj vendu ĝin kontraŭ \$3.00 al aliaj personoj.

(3) (a) La Prezidanto de ELNA, konsiliĝante kun la AAIE (Amerika Asocio de Instruistoj de Esperanto), nomu komitaton, kiu rajtos elspezi ĝis \$750 en la fiska jaro 1991 por eksperimenta aperigo de tri tasklibroj pri la temoj "Vocabulary Building", "Prepositions", kaj "Participles";

(b) La rezultojn de la eksperimento la komitato raportu al la Estraro, kun proponoj por eventuala aperigo de aliaj tasklibroj en la serio.

(4) Aprobas la buĝeton por la Esperanto-Ligo por Norda Ameriko por la fiska jaro 1991.

(5) Konfirmas s-ron Mike Donohoo kiel Direktoron de la Centra Oficejo.

Local Contacts

[* = Issues a regular or occasional bulletin or newsletter. + = Participates in information-requestor exchange program with ELNA.]

- Alaska: E-o Societo de Alaska, P.O. Box 240557, Douglas, AK 99824, tel. (907) 364-3309
- +Arizona: Wm. Shanks, E-o Soc. of AZ, 1345 W. Escarpa, Mesa, AZ 85201
- +California: E-o Assn. of Los Angeles, 1112-7th St. #811, Santa Monica, CA 90403
- *+California: E-o-Klubo de San Diego, Box 288012, San Diego, CA 92128-0991, (619) 528-0880
- +California: Inland Empire E-o Group, 22797 Barton Rd. #117, Grand Terrace, CA 92324, (714) 689-5576 or (619) 949-1958
- +California: Orange Co. E-o Assn., Box 1538, Garden Grove, CA 92642
- *California: E-o Soc. of Ventura County, 5968 Joshua Trail, Camarillo, CA 93012-4478, tel. (805) 484-9122
- +California: Santa Barbara E-o Soc., 5140 San Lorenzo Dr., Santa Barbara, CA 93111
- *+California: San Francisco E-o Regional Organization, 410 Darrell Rd., Hillsborough, CA 94010, (415) 342-1796
- *+California: Ligo de Orient-Golfaj E-istoj, Box 324, Berkeley, CA 94701-0324, (415) 770-1452
- *+California: E-o Group, P.O. Box 60860, Sacramento, CA 95860, (916) 485-3116
- +Colorado: Western Colorado Esperanto Center, c/o Martha Evans, 342 Hill Ave, Grand Junction, CO 81501, tel. (303) 242-0650
- *+District of Columbia: Washington E-o Soc., 4406 - 35th St. NW, Washington, DC 20008, (202) 363-6197
- +Idaho: David Baron, Box 37, Eagle, ID 83616
- +Illinois: Chicago E-o Soc., 5048 N. Marine Dr. #D-6, Chicago, IL 60640, tel. (312) 271-8673
- *+Indiana: E-o-Klubo de Indiana, p/a William Rieske, 1109 E. First St., Greenfield, IN 46140, (317) 462-1504
- +Maryland: Baltimore E-o Club, T. Goodman, 3218 Shelburne Rd., Baltimore, MD 21208
- *+Michigan: E-o Soc. of Michigan, P.O. Box 3011, Southfield, MI 48037, (313) 646-2965
- +Michigan: Soc. of E-o Language Friends, c/o James F. Hillaker, 6191 Finch Lane, Flint, MI 48506, (313) 736-7652
- +Michigan: E-o Club of Kalamazoo, 224 Rose Pl., Kalamazoo, MI 49001
- Michigan: Cereal City Esperanto Friends, p/a Michael Larkin, 3904 Beadle Lake Dr., Battle Creek, MI 49017
- +Minnesota: E-o Club of Minneapolis, 1528 Laurel Ave. #3, St. Paul, MN 55104
- *+Missouri: E-o-Asocio de Sankta-Luiso, P.O. Box 69144, St. Louis, MO 63169-0144
- +Montana: Montana E-o Soc., 330 Lindley Pl., Bozeman, MT 59715
- *+Nebraska: Nebraska Internacia-lingva Asocio, R.F.D. 1 Box 29, Wilber, NE 68465, (402) 821-2027
- +Nevada: Nevada Inform-Centro pri E-o, POB 50113, Reno, NV 89513, (702)746-0204
- *+New York: NYC E-o Soc., c/o Thomas M. Eccardt, 455 E. 14th St., #3C, New York, NY 10009
- New York: UN Office of UEA, 777 United Nations Plaza, New York, NY 10017
- +North Carolina: E-o Society of the Triangle, 5400 Belsay Drive, Raleigh, NC 27612, tel. (919) 781-0553
- +Ohio: E-o Assn. of Ohio, 1144 Kingsdale Terr., Columbus, OH 43220
- *+Oregon: Portland E-o Soc., 11905 SW Settler Way, Beaverton, OR 97005
- +Pennsylvania: E-o Society of Philadelphia, 26 E. Rounfont Rd., Philadelphia, PA 19119, (215) 248-0493
- +Puerto Rico: E-o Society of Puerto Rico, Dr. Tomas Sarramia, Box 22916 U. of Puerto Rico, San Juan, PR 00931
- Texas: E-o Study Group, P.O. Box 1446, Houston, TX 77251-1446, tel. (713) 522-7499, (713) 666-7509
- +Texas: Rio Grande Valley E-istaro, Prenda Cook, Box 7167, Harlingen, TX 78550, (512) 423-3056
- +Utah: E-o Club, Box 21346, Salt Lake City, UT 84121
- +Washington: Seattle E-o Soc., 6002 NE 61st St., Seattle, WA 98115
- Wisconsin: E-o Society of Wisconsin, 1958 N. 38th St., Milwaukee, WI 53208
- *Regional (Rocky Mountain States): Intermountain E-o Group (AZ, CO, ID, MT, NM, UT, WY), p/a Charles Tustin, P.O. Box 112, Coram, MT 59913
- *+Regional (Tidewater): E-o Society of the Carolinas and Virginia, Route 5 Box 303, Boone, NC 28607, (704) 264-2297
- *+Regional (New England): E-o Soc. of New England, P.O. Box 655, Concord, MA 01742, (508) 264-4349
- Special Interest: E-o-Language Toastmasters Club, P.O. Box 60860, Sacramento, CA 95860, (916) 485-3116
- Special Interest: American Association of Teachers of Esperanto, 5140 San Lorenzo Dr., Santa Barbara, CA 93111-2521, (805) 967-5241

VOJAĜU ESPERANTE 1991

• **Esperanto Classes**—July 1-19
San Francisco State University
"The best in the world!"

• **E.L.N.A. Annual Convention**
Raleigh-Durham, North Carolina
July 20-25

(Although the Interkona Vespero does not take place until Saturday evening the 20th, it's a good idea if possible to arrive Friday night because the L.K.K. is providing a full program of optional Esperanto programs during the day on Saturday. If you can arrive on the 19th, you won't have to miss any of them.)

AIR FARE IS EXPENSIVE THIS YEAR. BE SURE TO CONTACT ESPERANTO VOJAĜ-SERVO FOR DISCOUNTS ON THE AIR FARES TO RALEIGH-DURHAM AND BERGEN.

• **76a UNIVERSALA KONGRESO**
Bergen, Norway
27 July—3 August

• **POST-KONGRESA EKSKURSO**
3-12 aŭgusto

RESERVE OUR ESPERANTO VIDEO-TAPE ABOUT BERGEN. IT'S GREAT FOR MEETINGS AND CLASSES!

Lust Harmon
Esperanto Vojaĝ-Servo
6104 La Salle Ave.
Oakland, CA 94611
(415) 339-2001

Is it safe to travel this year?

As a professional in the travel business, I would not recommend traveling to the middle east this summer, but many destinations including Scandinavia are probably safer than staying home. It's certainly safer than driving on the California freeways! We have never seen more care taken to ensure the safety of travelers. It takes a lot longer to get checked in; you cannot check your bags at the curb; and there are a lot more questions about who packed your suitcase, who has had access to it, and what you have in it. We will certainly be traveling to Bergen this year, and we hope you will be able to join us!

Bergen is an ideal city for a convention. It is large enough to be interesting, but small enough to be easily managed. It is both "Norwegian" and international! It is also situated in one of the most beautiful areas in the world, has a delightfully mild summer climate, and is the gateway to fjordland. The convention program will be very interesting including beautiful concerts and theatricals in the comfortable and modern Grieg Hall.

EVS has reserved an affordable hotel in the center of town, about as close as you can get to the kongresejo, and we have reserved space on SAS Airlines with guaranteed fares back to the beginning of the fall season for the dates of the convention. This will prove to be a great savings for those of us lucky enough to go to Bergen!


POST-KONGRESA EKSKURSO CRUISE FROM BERGEN: 3 Aug.

- To the North Cape
- To Lapland
- To the Land of the Midnight Sun
- Fly back to Oslo for 2 days before flying home: 12 August

The MS Lofoten can take you on a voyage along the most beautiful coastline in the world. To many people, crossing the Arctic Circle is an unforgettable experience. But it is when the mountain walls of the Lofoten Islands rises from the sea that words fail completely. The ship is an attraction in itself—a floating hotel, always on the way to new sights, new experiences, new adventures. You will enjoy service and meals you could expect in a first-class hotel. Yet the Coastal Express ships are not cruise liners. They are a means of communication for the local people; they carry goods to supply the needs of the coastal communities—and they are part of Norway's maritime culture!

The atmosphere on board is informal and relaxed. Scenes continually change, but slowly enough to allow you to absorb them; and to feel at one with the life of the coast and the mighty scenery that surrounds you.

**CRUISE WITH FELLOW ESPERANTISTS
ENJOY NORWAY AT ITS BEST**
Space is limited—sign up today!



ELNA

President: Angela Harlow (1993), P.O. Box 551, Pinole, CA 94564, tel. (415) 222-0187
Vice President: Dr. Grant Goodall (1993)
Secretary: Virginia Stewart (1992)
Treasurer: John B. Massey (1991)
Other Board Members: Ellen Eddy (1991), Nels M. Nelson (1991), William H. Schulze (1991), Prenda Cook (1992), Frank Helmuth (1992), Dr. Jonathan Pool (1992), Dr. E. James Lieberman (1993), Sherry Wells (1993), David Wolff (1993)
Commissioners: Jim Deer (Tape Service), Joan Gildemeister (Legislative Affairs), Lucy Harmon (Travel Affairs), William R. Harmon (Central Office), Dorothy Holland-Kaup (Correspondence Courses), R. Kent Jones (Science & Technology), Dr. Julius Manson (United Nations), John B. Massey (Wills and Gifting), John B. Massey, William H. Schulze and Sidney V. Steinberg (Kapitala Fondusa Komitato), John Mathews (Service Clubs), Catherine Schulze (Postal Course), Ellie Stein (Women's Affairs)
Director, Central Office: Mike Donohoo
Vice-Director, Central Office: Ionel Onet

ELNA Archivist: Hal Dreyer

Any member wishing to assist in the work of any of the above named commissions or committees should communicate with the member(s) shown.

ELNA Dues for 1991

Regular	\$25
Family	\$37.50
Youth (under 26)	\$12.50
65 year or above	\$15
Sustaining	\$50
Life	\$500

ELNA is a non-profit organization functioning under IRS paragraph 501(c)3. Donations are tax-deductible.

A separate supporting category, "Friend of Esperanto," has been established. A Friend of Esperanto pays \$7.50 per year.

UEA dues 1991

Member-Guidebook only (MG)	\$ 7.00
Member-Yearbook only (MJ)	\$16.00
Member-Subscriber (MA)	\$39.00
Societo Zamenhof (additional)	\$78.00
Subscription only to Esperanto	\$23.00
Subscription only to Kontakto	\$12.00
Life Membership in UEA	\$975.00

Send payments for UEA memberships or subscriptions to ELNA, Box 1129, El Cerrito, CA 94530. Make all checks payable to ELNA.

MOVING? DON'T LEAVE ESPERANTO BEHIND! If you have moved recently or are planning to move in the near future, don't forget to send a change-of-address card to the ELNA Central Office, Box 1129, El Cerrito CA 94530. This will assure your continued receipt of the Newsletter and other information. If you don't have a stamp handy, give the CO a call at (415) 653-0998. Thanks!

DEADLINE FOR MATERIAL FOR ISSUE 1991(5) of Esperanto U.S.A. is July 25, 1991

ELNA Newsletter
Volume 27, No. 3
ISSN Pending
Esperanto League for North America, Inc.
P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530
Telephone: (415) 653-0998
Editor: Don Harlow